**ZKOUŠKY Z ESPERANTA** o 10. hod. dopolední **29. června 1912** **VALNÁ HROMADA B. U. E.** o 8. hod. večerní
**v kanceláři „Ústředního Svazu B. U. E." v Praze II. Vodičkova ulice č. 38.**




# BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

**Kun literatura aldono**

## LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

**Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de**
**CENTRA ASOCIO**
**BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)**

*Ni laboros por Esperanto.*

CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.
— SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION". —
KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38.
REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

**Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostřednictvím pp. jednatelů.**
Roč. I.—V. pro členy B. U. E. po K 2·20.

*Svaz jednotlivců „Ligo de Bohemaj Esperantistoj", Klub Esp. v Praze (dříve „U Donátů") a Klub Esp. v Radvanicích dávají členům tuto revui zdarma.*



**1912.** **DUBEN-KVĚTEN — APRILO-MAJO** **VI. 4. 5.**



**Roční předplatné: 3 K.** Ročník I.-V. po K 2·50. **Cena tohoto dvojčísla s přílohou: 60 hal.**

# ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

# BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů“, Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost.

Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

**„Časopis Českých Esperantistů“ en Praha II.** (**Bohemujo - Aŭstrio**).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.
Účet poštovní spořitelny 93.281.

* *



## OBSAH - ENHAVO:

# ORHARULINO.

*(El „Bohemaj fabeloj“ de K. J. Erben.)*

Estis unu reĝo kaj tiu estis tiom saĝa, ke li komprenis ĉiujn ekzistajojn, eĉ pri kio ili parolis. Kaj aŭskultu, kiel li tion ellernis: Foje alvenis al li iu maljuna avino, alportis al li en korbo serpenton kaj diris, ke li ordonu ĝin manĝpretigi: post kiam li ĝin formanĝos, ke li komprenos ĉion, kion ĉia besto en la aero, sur la tero kaj en la akvo parolas. Al la reĝo plaĉis, ke li scipovos, kion neniu scipovas, li pagis al la avino malavare kaj tuj li ordonis al la servisto, ke li tiun fiŝon pretigu por la tagmanĝo: „Sed“, li diris, „eĉ ne per langpinto ĝin gustumu, alie vi pagos tion per via kapo!“

Al Georgo, la servisto, ŝajnis stranga, kial la reĝo tiom severe tion al li malpermesis. „Dum mia tuta vivo mi ne vidis tiaspecan fiŝon, ĝi aspektas same kiel serpento! Kaj kiom valorus kuiristo, kiu eĉ ne gustumus tion, kion li manĝpretigas?“ Kiam ĝi estis rostita, li prenis peceton sur la langon kaj gustumis. En la sama momento li aŭdas ĉirkaŭ la oreloj ion zumi: „Al ni ankaŭ ion! Al ni ankaŭ ion!“ Georgo ĉirkaŭrigardas, kio ĝi estus kaj vidas nenion krom kelke da muŝoj, kiuj flugetadis en la kuirejo. Jen refoje ekstere sur la strato iu sible vokas: „Kien do? Kien do?“ Kaj malpli fortaj voĉoj respondas: „En la hordeon de la muelisto. En la hordeon de la muelisto.“ Georgo rigardas tra la fenestro kaj vidas viranseron kun aro da anserinoj. „Ho,“ li diras, „tia estas do tiu fiŝo?“ Kaj li jam sciis, kio estas. Rapide li enŝovis ankoraŭ peceton en la buŝon kaj poste li portis la serpenton al la reĝo, kvazaŭ nenio estus okazinta.

Post la tagmanĝo ordonis la reĝo al Georgo, ke li selu por li ĉevalon, ĉar li volas promenrajdi kaj ke li akompanu lin. Kiam ili rajdis sur verda herbejo, saltetis la ĉevalo de Georgo kaj ekblekis: „Ho-ho-ho-ho frateto, mi sentas min tiel malpeza, ke mi volus saltadi trans montoj!“ — „Tio estas facile dirita,“ respondas la alia, „mi ankaŭ ŝatus saltadi, sed sur mi sidas la maljuna: se mi eksaltos, li deruliĝos kiel sako kaj rompos la nukon“. — „Li rompu, ĉu tio estas grava?“ diris la ĉevalo de Georgo, „anstataŭ la maljuna vi portados junan.“ — Georgo elkore ridis pri tiu ĉi interparolo, sed nur tiel, kaŝe, ke la reĝo ne rimarku tion. Sed la reĝo ankaŭ bone komprenis, kion la ĉevaloj al si rakontis, li rerigardis kaj vidante, ke Georgo ridas, li demandas: „Pri kio vi ridas?“ — „Pri nenio, via reĝa moŝto! nur ia ideo venis al mi,“ elturniĝe respondis Georgo. La maljuna reĝo tamen jam eksus-

pektis lin, kaj al la ĉevaloj li ankaŭ ne konfidis plu; li returnis kaj — tuj hejmen.

Kiam ili alrajdis en la kastelon, ordonis la reĝo al Georgo, ke li enverŝu por li pokalon da vino: „Sed via kapo falos," li diris, „se vi ne plenverŝos aŭ superverŝos. — Georgo prenis verŝkruĉon kun vino kaj li verŝas. Subite alflugis tra la fenestro du birdetoj; unu persekutis la alian kaj tiu forkuranta havis tri orajn harojn en la beketo. „Donu ilin al mi," diras la unua, ili apartenas ja al mi!" — „Mi ne donos ilin, miaj ili estas! mi levis ilin por mi!" — „Sed mi vidis ilin, kiam ili falis, kiam al orhara knabino sin kombis. Donu al mi almenaŭ du!" — „Eĉ ne unu!" — Kaj nun la dua birdeto lin sekvante ekkaptis la orajn harojn. Kiam ili tiel, flugante, luktis pri la haroj, restis al ĉiu po unu en la beketo kaj la tria ora haro falis sur la teron, ke tio eksonoris. En tiu momento Georgo ĝin postrigardis kaj superverŝis. „Vi perdis la vivon!" ekkriis la reĝo, „sed mi volas indulge vin trakti, se vi venke akiros la orharan knabinon kaj alkondukos ŝin al mi, ke ŝi fariĝu mia edzino".

Kion povis fari Georgo? Se li volis savi sian vivon, li devis serĉi la knabinon, kvankam li eĉ ne sciis, kien li sin turnu. Li selis sian ĉevalon kaj rajdis tra ie ajn. Li alrajdis al nigra arbaro kaj jen sub la arbaro apud la vojo brulis arbetaĵo; ekbruligis ĝin paŝtistoj. Sub la arbetaĵo estis formikejo kaj la fajreroj faladis sur ĝin kaj la formikoj kun siaj blankaj ovetoj kuradis ĉi tien kaj tien. „Ho, helpu, Georgo, helpu," ili vokis angore, „ni forbrulos kaj ankaŭ niaj idoj en la ovetoj". — Li tuj malsupren de la ĉevalo, la arbetaĵon dehakis kaj la fajron estingis. — „Kiam vi tion bezonos, rememoriĝu pri ni kaj ni ankaŭ helpos vin."

Poste li rajdis tra tiu arbaro kaj venis al alta abio. Supre sur la abio estis nesto de frugilegoj, kaj malsupre sur la tero du idoj pepis kaj plendis: „La patro kaj patrino forflugis de ni; ni devas mem serĉi por ni nutraĵon kaj ni, malfeliĉaj birdidoj, ne scias ankoraŭ flugi! Ho, helpu, Georgo, helpu! satigu nin, aŭ ni mortos pro malsato." — Georgo ne pripensadis longe, desaltis de la ĉevalo kaj enpikis en ĝian flankon la glavon, por ke la birdidoj havu nutraĵon. „Kiam vi tion bezonos," ili grakis ĝoje, „rememoriĝu pri ni kaj ni ankaŭ helpos vin".

Poste devis Georgo jam piediri. Li iris longe, longe tra la arbaro kaj kiam li fine estis eliranta el ĝi, li vidis antaŭ si vastan, larĝan maron. Sur la marbordo du fiŝkaptistoj interdisputadis. Ili kaptis grandan oran fiŝon en la reton kaj ĉiu volis ĝin havi por si mem. „Mia estas la reto, mia estas la fiŝo!" — Kaj la dua: „Malmulte helpus vin la reto, se ne estus mia barko kaj mia kunhelpo." — „Kiam la venontan fojon ni kaptos similan fiŝon, ĝi

estos via." — „Ne tiel, vi atendu la duan kaj ĉi tiun donu al mi!" — „Mi juste decidos inter vi," diras Georgo, „vendu al mi tiun fiŝon, mi ĝin bone pagos al vi kaj la monon dividu inter vi po duono". Kaj li donis al ili ĉiun monon, kiun li ricevis de la reĝo por la vojaĝo kaj nenion li retenis por si. La fiŝkaptistoj ĝojis, ke ili tiel bonpreze vendis kaj Georgo lasis la fiŝon refoje en la maron. Ĝoje ĝi ekplaŭdis tra la akvo, subakviĝis kaj poste proksime de la bordo ĝi ankoraŭ unufoje elŝovis la kapon: „Kiam vi min, Georgo, bezonos, rememoriĝu pri mi, mi reservos al vi." Kaj poste ĝi malaperis. — „Kien vi iras?" demandis la fiŝkaptistoj Georgon. — „Mi iras serĉi por mia estro, la maljuna reĝo, fianĉinon, la orharan knabinon, kaj mi eĉ ne scias, kie ŝin serĉi." — „Ho, pri tiu ni bone povas vin informi," diris la fiŝkaptistoj: ĝi estas Orharulino, filino de la reĝo el la kristala kastelo jen tie sur la insulo. Ĉiun tagon matene, kiam tagiĝas, ŝi diskombas la orajn harojn: de ili brile radias la ĉielo kaj la maro. Se vi volas, ni mem vin veturigos tien sur tiun insulon, ĉar vi nin tiel juste juĝis. Sed bone atentu, ke vi la ĝustan knabinon elektu: estas dekdu knabinoj, filinoj de la reĝo, sed sole unu havas orajn harojn."

Kiam Georgo estis sur tiu insulo, li iris en la kristalan kastelon por peti la reĝon, ke li donu sian orharan filinon al lia estro, la reĝo, kiel edzinon. — „Mi donos ŝin," diris la reĝo, „sed vi devas ŝin servogajni: vi devas dum tri tagoj fari tri laborojn, kiujn mi donos taske al vi, ĉiun tagon po unu. Intertempe ĝis morgaŭ vi povas ripozi". — La sekvantan tagon matene diras al li la reĝo: „Mia Orharulino havis fadenon da multekostaj perloj; la fadeno ŝiriĝis kaj la perloj disŝutiĝis en altan herbon sur verda herbejo. Tiujn perlojn vi devas ĉiujn rekolekti, ke eĉ unu ne manku." — Georgo iris sur la herbejon, ĝi estis larĝa kaj vasta. li genuis en la herbon kaj komencis serĉi. Li serĉis, serĉis de mateno ĝis tagmezo, sed eĉ unu perleton li ne ekvidis. „Ho, se ĉi tie estus miaj formikoj, tiuj povus helpi min!" — „Ni estas ja ĉi tie, por ke ni vin helpu," diris la formikoj, aperante de ie-kie, kaj ĉirkaŭ li dense ili svarmis. „Kion vi bezonas?" — „Mi devas kolekti perlojn sur tiu ĉi herbejo, sed mi vidas eĉ ne unu." — „Nur iomete atendu, ni ilin kolektos anstataŭ vi." Kaj ne daŭris longe, ili kunportis al li el la herbo amaseton da perloj, li bezonis nenion fari krom ilin surfadenigi. Kaj poste, kiam li volis jam nodligi la fadenon, lamaliris ankoraŭ unu formiketo; ĝi estis lama, la kruro forbrulis tiame al ĝi, kiam ĉe ili brulis, kaj ĝi kriis: „Atendu, Georgo! ne ligu, mi alportas ankoraŭ unu perleton!"

Kiam Georgo alportis la perlojn al la reĝo kaj la reĝo ilin kalkulis, mankis eĉ ne unu. „Bone vi faris vian taskon," li diras,

„morgaŭ mi donos al vi alian laboron.“ — Matene Georgo venis kaj la reĝo diris al li: „Mia Orharulino sin banis en la maro kaj perdis tie oran ringon: tiun vi devas trovi kaj alporti.“ — Georgo iris al la maro kaj iradis malĝoje sur la bordo; la maro estis pura, sed tiom profunda, ke li ne povis eĉ la fundon vidatingi kaj kiel li sekve trovu sur la fundo la ringon?“ Oh, se ĉi tie estus mia ora fiŝo, tiu povus min helpi!“ — Kaj tuj en la maro io ekbrilis kaj el la profundajo suprennaĝis la ora fiŝo: „Jen, mi estas ja ĉi tie por helpi vin, kion vi bezonas?“ — „Mi devas en la maro trovi oran ringon kaj mi vidas eĉ ne la fundon.“ — „Jus mi renkontis ezokon-fiŝon, ĝi portis oran ringon sur la naĝilo. Nur iomete atendu, mi alportos ĝin al vi.“ Kaj ne daŭris longe, ĝi revenis el la profundajo kaj alportis al li la ezokon kune kun la ringo.

La reĝo laŭdis refoje Georgon, ke li bone faris sian aferon: kaj poste matene li donis al li taske la trian laboron: „Se vi volas, ke mi donu mian Orharulinon al via reĝo kiel edzinon, vi devas alporti por ŝi mortan kaj vivan akvon, ĝi estos ja bezona.“ — Georgo, ne sciante, kien sin turni por la akvo, iris laŭhazarde tra ie-kie, kien lin la piedoj portis, kaj li alvenis en nigran arbaron. „Oh, se ĉi tie estus miaj frugilegoj, tiuj eble helpus min!“ — Jen io eksusuris super lia kapo kaj de ie-kie aperis du frugilegoj: „Ni estas ja ĉi tie, por helpi vin. Kion vi deziras?“ — „Mi devas alporti vivan kaj mortan akvon kaj mi ne scias, kie mi ĝin serĉu.“ — „Pri tiu ni bone scias. Iomete nur atendu, ni alportos ĝin al vi.“ „Kaj post nelonga tempo ili alportis al Georgo po unu kukurbo da akvo: en unu kukurbo estis viva akvo, en la alia malviva. Georgo estis kontenta, ke li tiel bone sukcesis kaj rapidis al la kastelo. Sur la rando de la arbaro li vidis araneajon streĉitan de abio al abio; meze da la araneajo sidis granda araneo, ĝi suĉis muŝon. Georgo prenis la kukurbon kun la morta akvo, surŝprucigis la araneon kaj la araneo deruliĝis sur la teron kvazaŭ matura ĉerizo, ĝi estis morta. Poste li surŝprucigis la muŝon per viva akvo de la alia kukurbo kaj la muŝo komencis barakti, eliĝis el la araneajo kaj — for en la aeron. „Via feliĉo, Georgo, ke vi revivigis min, ĝi zumis al li ĉirkaŭ la oreloj, sen mi vi apenaŭ estus diveninta, kiu el la dekdu estas la Orharulino.“

Kiam la reĝo vidis, ke Georgo la trian taskon ankaŭ plenumis, li diris, ke li donos al li sian orharan filinon. „Tamen,“ li diris, „vi mem devas ŝin elekti.“ — Poste li kondukis lin en unu grandan ĉambron, tie meze estis rondforma tablo kaj ĉirkaŭ la tablo sidis dekdu belaj knabinoj, unu kiel la alia, sed ĉiu havis sur la kapo kaptukon, longan ĝis la tero, blankan kiel neĝo, tiel, ke neniom estis videbla, kiajn harojn ĉiu havas. — „Jen estas

miaj filinoj.“ diras la reĝo; „se vi divenos, kiu el ili estas Orharulino, vi gajnis ŝin kaj vi povas ŝin tuj kune forkonduki; se vi ne divenos, ŝi ne estas destinita por vi kaj vi devas foriri sen ŝi.“ — Georgo estis premata de la plej granda angoro, li ne sciis, kion komenci. En tiu momento io ekflustris al li en la orelon: „Bz — bz! iru ĉirkaŭ la tablo, mi diros al vi, kiu estas la vera.“ Ĝi estis la muŝo, kiun Georgo revivigis per la viva akvo. — „Tiu ĉi knabino ĝi ne estas — tiu ankaŭ ne — tiu ankaŭ ne — — tiu ĉi estas Orharulino!“ — „Tiun ĉi filinon donu al mi!“ ekvokis Georgo, „tiun mi servogajnis por mia estro.“ — „Vi divenis,“ diris la reĝo kaj la knabino tuj ankaŭ leviĝis de la tablo, forvualis la kaptukon kaj la oraj haroj ondiĝis en riĉaj faskoj de la kapo ĝis la tero kaj de ili estis tiom hele, kvazaŭ se matene la suneto eliras, ke al Georgo eĉ la okuloj nebulkovriĝis.

Poste donis la reĝo al la filino ekipon por vojaĝo, kiel decas kaj konvenas, kaj Georgo ŝin forkondukis al sia estro kiel fianĉinon. Al la maljuna reĝo la okuloj briletis kaj li saltetis pro ĝojo, kiam li vidis la Orharulinon kaj tuj li ordonis, ke oni faru preparojn por la edziĝa festo. „Mi volis vin kvankam pendigi pro via malobeemo, ke la frugilegoj vin formanĝu,“ li diras al Georgo; „sed ĉar vi al mi tiom bone servis, mi lasos al vi sole la kapon per hakilo dehaki kaj poste mi lasos vin honore enterigi.“ — Kiam oni Georgon estis ekzekutintaj, petis Orharulino la maljunan reĝon, ke li donacu al ŝi la mortan serviston kaj la reĝo povis tion neniel al sia orhara fianĉino rifuzi. Poste ŝi alĝustigis la kapon de Georgo al la korpo, surŝprucigis lin per morta akvo kaj la korpo kunkreskis kun la kapo, tiel ke post la vundo ne restis eĉ signeto; poste ŝi surŝprucigis lin per viva akvo, kaj Georgo refoje leviĝis, kvazaŭ li estus renaskiĝinta, freŝa kiel cervo kaj la juneco brilis kaj lumis el lia vizaĝo. „Ho, kiom profunde mi dormis!“ diras Georgo kaj frotas al si la okulojn. — „Vere, profunde vi dormis,“ diris la Orharulino,“ kaj se mi ne estus ĉi tie estinta, dum eternaj tempoj vi ne estus revekiĝinta!“ — Kiam la maljuna reĝo vidis, ke Georgo refoje viviĝis kaj ke li estas pli juna kaj pli bela ol li antaŭe estis, li estus ŝatinta ankaŭ laŭ la sama maniero rejuniĝi. Tuj li ordonis, ke oni ankaŭ lin senkapigu kaj poste per tiu akvo surŝprucigu. Oni senkapigis lin kaj surŝprucigadis lin per la viva akvo ĉiam, senĉese, ĝis oni ĉiun elŝprucigis: sed la kapo neniel volis alkreski al la korpo; nur poste oni komencis surŝprucigi per la morta akvo kaj en momento la kapo alkreskis: sed nun la reĝo refoje estis morta, ĉar oni ne havis plu vivan akvon por lin revivigi. Kaj ĉar reĝolando sen reĝo ne povis esti kaj ĉar neniun tiel saĝan oni havis, oni proklamis Georgon reĝo kaj la Orkapulinon reĝino. *D. K.*

# FAUST EN LA HISTORIO.

Eble pri neniu viro estis elpensitaj tiom da legendoj, kiuj plejparte estas miksaĵo el mensogo kaj vero, kiel pri Faust. La unua homo, kiu almenaŭ iom levis el polvo la memoron pri Faust en okuloj de siaj samgentanoj, estis la germana poeto Goethe. En la plej nova tempo neforgeseble meritiĝis per la prifausta esplorado Karolo Kiesewetter.

La unuan skriban dokumenton pri la ekzistinteco de Faust oni trovas en la letero, kiun skribis teologo abato Trithemius el Sponheim al sia amiko Wirdung; en tiu li aludas pri sia renkontiĝo kun Faust. La alia skriba kaj ĝis la nuna tempo konservita sciigo troviĝas en letero de Konrad Mudt (lat. Mutianus Rufus † 1526), kanoniko en Gotha, amiko de Reuchlin kaj Melanchton. En la jaro 1513 parolas Mudt en la citita letero pri Faust kaj asertas, ke li faras verajn miraklojn, kaj proklamas lin sorĉisto. El la tempoj, kiam Faust vagadis tra la tuta Germanujo kaj vizitis ankaŭ Francujon, Galicion, Svisujon k. t. p., devenas ĉie en la diverslokaj arĥivoj kaj urbaj kronikoj troviĝantaj aŭtentikaj raportoj pri lia ekzisteco kaj restado. Estas por ni interesa ankaŭ tio, ke Faust iun tempon vivis ankaŭ en Praha, pri kio al ni konserviĝis dokumentoj en verkaĵoj de li postlasitaj. Aliajn dokumentojn prezentas kroniko de la urbo Erfurt, kie Faust tre ofte pasigadis la tempon. Kiel oni sciiĝas de Henriko Cornelius Agrippa el Nettesheim, la franca kortega astrologo, estis Faust en j. 1528 en servoj de la franca reĝo Francisko I., kiun li devis helpadi per sia sorĉarto en la milito kontraŭ Karolo V. Pluajn pruvojn pri la ekzistinteco de Faust ni trovas ankaŭ en verkoj de medicinisto Filipo Begardi, en la libro „Index sanitatis“, kie ni legas, ke Faust estis okupita per servado al multaj princoj en-kaj eksterlandaj, ke li estis sperta pri ĥiromantio, kristalomantio, kuracado k. t. p., kaj estas tie komparata al Theophrastes Paracelsus. Same Martin Luther aludas lin en siaj „tabloparoladoj“ (Tischreden) pli ol unufoje kaj avertas antaŭ li Ĝis la nuna tempo vivas la famo pri Faust inter la popolo, multaj stratoj kaj konstruaĵoj portas lian nomon.

Tio estas vico de la plej gravaj historiaj atestantoj kaj samtempuloj de Faŭst, kaj nun sekvu resumo de lia vivo mem, kiel ĝin garantias la historio.

Faust naskiĝis en la j. 1489 en urbeto Knittlingen kiel filo de malriĉaj gepatroj, kiujn al li la morto tre frue forrabis. Ankoraŭ aliaj urboj en Germanujo disputas pri la preferaĵo povi esti nomataj lia naskiĝejo; tiel ekzemple Anhalt, Salzwedel, Frankfurt a. M. k. a. En Frankfurt vivis ĝis komenco de la laste pas-

inta jarcento patricia familio nomata Faust, kiu estis kun dr. Faust parence ligita. Sed per la historio estas pruvite, ke Knittlingen estis lia vera naskloko. Ĉi tiu urbeto estis en subula rilato al la proksima monaĥejo Maulbronn, kaj per tio ankaŭ klariĝas la pli poste sekvintaj interrilatoj de Faust kun la tieaj monaĥoj.

Kiel la kroniko plue rakontas, estis Faust knabo tre vigla kaj rapide komprenanta; tial igis lin studadi iu malproksima, laŭdire tre riĉa parenco de nekonata nomo. Pri la unuaj jaroj de lia vivo mankas al ni pli detalaj sciigoj, nur en la j. 1509 ni trovas lin kiel gajan studenton ĉe la universitato en Heidelberg. Ĉi tie li estis kolego de Melanchton; li lernis eminente kaj akiris frue la rangon de bakalaŭreo de teologio kaj poste ankaŭ doktorecon. Kiel neriĉa studento li sin vivtenadis de la instruado de knaboj, ĉar tiam ne ekzistis elementaj lernejoj laŭ nia senco, kaj similajn lernejetojn rajtis malfermi al si kiu ajn. Tiutempe li kulpiĝis per iu delikto pro junuleca malprudento — li estis tiam 20-jara. Kio ĝi eble estis, ne estas konate, sed liaj pli postaj malamikoj eluzis ĉi tiun okazon kaj rakontadis poste tiajn aferojn, ke homo kun sana prudento ion tian absolute ne povas kredi — jam konsidere la fruan junecon de Faust.

Fininte la studadon en Heidelberg kaj tedita pro la spiritlimiga pedanteca filozofio de la tiamaj tempoj, Faust ĉirkaŭrigardis, kie li povus kvietigi sian spiriton, soifantan pri ekkono kaj sciado. Li sopiris je io pli alta, je io nekonata, kaj tion la oficialaj fakultatoj ne povis al li doni.

Fine li decidiĝis por la magia fakultato de la universitato en Krakovo. Tie, kiel ĉe la universitatoj en Toledo kaj Salamanca en Hispanujo kaj en Neapolo, estis starigita katedro por la magio. — La krakova fakultato havis famon kiel la plej bona de sia speco. Kiel ĉe la aliaj universitatoj, kie ekzistis similaj fakultatoj, oni prelegis tie la tiel nomatan „magia naturalis“. Ĝi estis konglomerato de la rudimentoj de ĥemio, fiziko, optiko, magnetismo, hipnotismo k. t. p.

Oni sin tie okupadis pri la preparado de diversaj tinkturoj, kosmetikajoj k. t. p. En antikvaj herbarioj oni legosciiĝas pri la tuta vico da similaj receptoj, kiuj tiame estis konsiderataj kiel fabele misteraj aŭ miraklaj kaj hodiaŭ estas ĝenerale konataj. Ĝi estis aferoj entute tre neriproĉeblaj kaj eĉ ne iomete flarsentigis la nigran magion.

Sed ĉi tiu restado de Faust en Krakovo estis kaŭzo, ke pli poste disfamiĝis pri li, ke li vizitadis specialan inferan lernejon, kie diablo „in persona“ (persone) instruadis matematikon, fizikon, meĥanikon, teologion, (!) jurosciencojn, medicinon, astrologion kaj magion. Estas ankaŭ notinde, ke la krakovaj studentoj nekon-

tentiĝadis per la oficialaj prelegoj, sed formadis inter si pli malpli sekretajn rondetojn, kie ili kune studadis antikvajn librojn, precipe kabalon, tiam multe disvastigitan.

Pri la vivo de Faust en Krakovo ni ankaŭ malhavas pli detalajn sciigojn. Lia tre scenoriĉa historio mem komenciĝas per lia reveno el Krakovo, kiam li aperas jam kiel perfekta magiisto. Li vojaĝas tra Germanujo, iras Francujon kaj Italujon — en tiun tempon falas ankaŭ lia restado en Praha — kaj komencas servi al diversaj grandsinjoroj. Pri liaj majstraĵoj, kiujn li diversloke praktikis, estis skribitaj ampleksaj kronikoj.

Faust mem postlasis kelke da libroj, krom tuta serio da verkajoj apokriafaj kaj aljuĝataj al li sole pro motivoj reklamaj. Lia plej konata verko estas la fama „Höllenzwang". Faust mortis proporcie juna, scie en la 50a jaro de sia vivo en vilaĝo Stampfen apud Freiburg en Breisgau en la jaro 1539, frapita laŭ ĉiuj signoj de apopleksio.

*K. Sázavský.*

# PROPAGATORŮM.

*Námitka 8.* **Lidé různých národností nemohou vyslovovati jazyk mezinárodní stejně a proto nemohou se jím dorozuměti.**

Již dávno bylo dokázáno nesčetnými pokusy, že tato domněnka jest nesprávnou: než také theoreticky lze dokázati, že stejná výslovnost jest možna.

Zkušenost učí, že všichni lidé jsou s to, třebas po dosti značné námaze, vyslovovati stejně všechny zvuky; příčina, proč cizinec špatně vyslovuje jazyk národní, spočívá v tom, že jest velmi nesnadno naučiti se správné výslovnosti nikoli hlásek, nýbrž slov, poněvadž musíme se učiti výslovnosti téměř každého slova zvlášť. Výslovnost hlásek, z nichž se skládá nějaké slovo, závisí totiž často na místě, které to neb ono písmeno ve slově zaujímá vzhledem k ostatním a proto se může měniti dle slov.

Naproti tomu, sestavíme-li abecedu, jako v Esperantu, tak, aby se každé písmeno vyslovovalo stejně bez ohledu na jeho postavení ve slovech, dovede velice snadno vyslovovati všechna slova příslušník kteréhokoli národa. K tomu pak, aby pochopil, jak má vysloviti tu neb onu hlásku, stačí, srovnáme-li je s hláskami jeho vlastního jazyka. Proto je záhodno, zvoliti pro abecedu jazyka mezinárodního takové zvuky, které lze snadno naznačiti lidem všech národností; nemůžeme se ovšem omeziti na zvuky společné všem jazykům světa, poněvadž počet zvuků těch jest velmi malý (asi 8). Třeba jen vyloučiti zvuky zcela zvláštní, vlastní jen jednomu jazyku, na př. anglické th, polské tvrdé l, české ř a

podobné. V tom jeví se genius vynálezce jazyka; rozluštění tohoto problému jest možné, jak dokazuje Esperanto.

*Námitka 9.* **Uměle utvořeného jazyka nelze užíti v literatuře původní a v překladech.**

Předně nic nepřekáží tomu, aby umělý jazyk sloužil k vyjadřování nejvyšších a vniterných pocitů, jako to činíme jazyky živými. Bylo-li dokázáno, že takový jazyk může vyjádřiti všechny praktické a materielní potřeby a postačiti všem stykům mezi lidmi, pak jest nesporno, že „jsou lidé, kteří snaží se mluviti lépe nežli ostatní. Jsou umělci jazyka, kteří se vynasnažují mluviti řečí vázanou nebo vypravovati mluvou lahodnější, než jest zvykem. Jak jest možno zakázati, aby nadaný člověk psal nebo mluvil formou vzletnější než jiný, který užívá jazyka jen v krátkých větách, prodávaje nebo rozkazuje“. (Privat.) A Esperanto již dávno dokázalo, že lze jím vystihnouti nejdelikátnější a nejdojemnější city; jeho literatura, ačkoliv jest ještě v zárodcích, vykazuje již mnohá pozoruhodná původní díla. Ostatně literatura ta svou mezinárodností i povýšeností nástroje, jehož užívá — jazyka — vynikne nad literatury národní, když ruka genia vyloudí z nástroje toho překrásné zvuky, protože vyjádří hluboké pocity lidské duše.

Jest rovněž jisto, že překlady v jazyce umělém nemohou podati přesný obraz původních, národních děl: překlady do národních jazyků rovněž nejsou toho schopny, leč literární dílo sleduje dvojí směr: formu a obsah; tento pak může překlad velmi dobře vystihnouti. Umělý jazyk dokonce předstihuje v tomto ohledu jazyky národní, jichž zvláštnosti samy dávají jim jiný ráz. Jazyk umělý však zvláštností nemá: jest logický a proto podává každou myšlenku ve tvaru původním, v němž jeví se jasnější a volnější než v rouše jazyka národního. Překládání z jednoho jazyka národního do druhého jest takořka převlékání myšlenek, při němž nové roucho přečasto ohrožuje jejich přesný tvar, zahalujíc je obraty jim nevhodnými. A přečasto, když jsme poznali holou myšlenku, přejeme si poznati ji v rouše, kterým ji oděl původce a které jí zřejmě dodává nenapodobitelné spanilosti: proto budeme lákáni učiti se jazyku národnímu, v němž myšlenka ta poprvé byla vyřčena.

*Námitka 10.* **Mezinárodní jazyk umělý nemůže míti úspěchu: viz volapük, který měl tisíce přívrženců a přece v krátké době zanikl.**

Z nezdaru nějakého podniku nesmíme souditi, že neúspěch stihne každý pokus podobný. Nutno alespoň předem vyšetřiti, nejeví-li nový pokus tytéž nedostatky, které zavinily nezdar pokusu prvého.

Hlavní příčinou zániku volapüku byla jeho nesnadnost. Byl sice zpočátku uvítán jazyk ten s nadšením přívrženci myšlenky

řeči mezinárodní — bylť to první jazyk umělý opravdu uskutečněný — a tito idealisté nedali se zastrašiti jeho nesnadností. Ale jakmile se pokusili získati lidi praktické a nepříliš vzdělané, shledali, že jest to nemožné, poněvadž učení se tomuto jazyku vyžadovalo příliš mnoho práce. Tu se domnívali někteří volapükisté, že je třeba učiniti některé změny v jazyku, a poněvadž velká jeho část byla libovolně autorem vymyšlena a nespočívala na nezvratných zásadách theoretických, nemohl se autor těmto návrhům z dobrých důvodů vzpírati; reformátoři pak sami se neshodli, a proto volapük, rozpadnuv se v různé idiomy, zanikl.

Z toho vyplývá, že ke zdaru nového pokusu jest nutno, 1. aby byl způsobilým prostředkem dorozumívacím, 2. aby byl dosti snadným, tak aby se mu mohli naučiti všichni lidé, i prostředně vzdělaní, 3. aby vylučoval vznik jiného jazyka mezinárodního, mnohem snadnějšího, 4. aby byl založen na nepopíratelných zásadách, předem stanovených, a konečně 5. aby jevil nejméně známek libovůle autorovy, které by umožnily oprávcům — vždy se vyskytujícím — aby uplatnili svou manii.

Esperanto splňuje tyto podmínky, a proto fiasko volapüku nic proti němu nedokazuje.

*Námitka 11.* **Mezinárodní umělý jazyk se rychle poruší užíváním jako každý jazyk živý a pro své idiomismy stane se pak nesnadno naučitelným, čímž ztratí svou potřebnou kvalitu.**

Idiomismy v národních jazycích vznikají buď užitím slova v jiném významu, než jak pravidly jazyka stanoveno, nebo špatným sestavením věty pokud se týče skladby. Takovýchto chyb dopouští se ti, kdo neovládají dostatečně mateřštiny. V umělém jazyce mezinárodním netřeba se obávati podobných poruch ze dvou důvodů: jednak bude tohoto jazyka užíváno mnohem větší měrou písemně než ústně, větší péče, která se věnuje jazyku v písmě, jakož i dostatečná znalost jazyka těmi, kteří v písemných stycích ho užívají, zaručuje, že podobné poruchy mohou se vyskytnouti velmi zřídka. Svede-li pak někoho jazyk mateřský k záměně pojmu slovního v jazyce umělém, pak tato chyba, jsouc nesrozumitelna cizinci, zůstane nenapodobena a do jazyka nevnikne. Ti, kdo mají snahu reformační, tvrdí, že již existují v Esperantu idiomismy, t. j. tvary, jimž podle pouhého Fundamenta a pravidel slovotvorby nelze rozuměti. Toto mínění jest nesprávné a spočívá na nesprávném pochopení zásad Esperanta. Zdá-li se, že tomu tak jest, pak děje se tak pouze z toho důvodu, že takové tvary odpovídají mezinárodnímu způsobu myšlení (na př. slunce zapadá a pod.), zkrátka tvary ty jsou mezinárodní idiomismy, totiž nejsou idiomismy v jazyce mezinárodním.

*Aug. Očenášek:*

# VIRINO KAJ GIMNASTIKO. *(Fino.)*

En komenco estis ilia tasko sole faciligi al virino la oblecon partopreni en la ekzercoj, kiujn tiutempe gvidadis viroj. Tamen tuj, kiam maturiĝis la Sokolaj virinoj kaj spertiĝis en la societa vivo, ili ne plu kontentiĝis per la duaranga enviciĝo en la societoj kaj postulis influon je administrado de la societo. Paŝo post paŝo ili atingis preskaŭ egalan rajton kun la viroj kaj hodiaŭ ili havas jam influon je administrado de la sokolaj institucioj kun ia difinita limigo, ankaŭ en la plej altaj korporacioj sokolaj (distriktaj unuiĝoj) kaj en la komitato kaj prezidantaro de la Bohema Unio Sokola. Evoluiĝo de la situacio pruvas, ke la virino atingos absolute plenan egalrajtecon kun la viro krom negrava limigo. t. e. neebleco atingi difinitajn funkciojn, ekzemple la estrecon kaj prezidantecon de komuna organizajo, kiuj por ĉiam estos rezervitaj por viroj.

Esta fakto nerefutebla, ke la granda evoluo de virina gimnastiko dankas sole tiun cirkonstancon, ke ĝi estas aligita al la sokolaj unuiĝoj. Sub ilia matura organizacio kaj ĉe ilia gimnastika kapablo trovis protekton la juna virina movado por la unuaj paŝoj en la vivo.

La cifera evoluo de la virinaj filioj de sokolaj organizajoj estas jena:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| en jaro | 1869: | unu societo | | | |
| „ „ | 1898: | 43 | societoj kun | 2.000 | membroj |
| „ „ | 1903: | 198 | „ „ | 6.755 | „ |
| „ „ | 1910: | 473 | „ „ | 14.585 | „ |

Bona mezurilo por tiu evoluo estas ankaŭ la publikaj prezentiĝoj, precipe ĉe la sokolaj festoj. En la jaro 1899 kuraĝis la virinoj por la unua fojo aperi antaŭ la publiko, scie en la gimnastikejo de Sokol en Praha. Tiame sin prezentis sume 320 ekzercantinoj el Praha kaj el provinco. La prezentado estis propagandocela. Sed jam ĉe la kvara kongreso en la jaro 1911 prezentiĝis 900 virinoj ekzercantaj per konusoj kaj sur ilaro.

Ĉe la kvina kongreso en la jaro 1907 ekzercis jam 2200 virinoj per konusoj kaj prezentis dancludojn, kaj ĉe la sesa kongreso de tiu ĉi jaro partoprenos 5500 virinoj ekzercadon sen kaj per ilaro.

La virinan gimnastikon gvidadis en la komenco viroj, kaj ĝi enhavis en si multe de la vireca karaktero. Sed baldaŭ oni sentis, ke virina gimnastiko tamen devas esti alkonformigita al la karaktero virina. Tial estis en jaro 1901 elektita de B. U. S. ko-

misio konsistanta el fakpersonoj pri la vira gimnastiko, el virinoj kaj kuracistoj, kiuj parte fiksis la ĝeneralajn principojn, laŭ kiuj direktiĝu la virina gimnastiko, parte trastudis la tutan ekzercan materialon de la sokola sistemo kaj difinis, kio el ĝi konvenas por virinoj. Plej zorge oni esploradis precipe la ekzercojn sur ilaro, pri kiuj estis la plej fortaj disputoj.

La komisio funkcias ĝis nun senĉese sed la plej gravan parton de sia laboro ĝi plenumis en daŭro de proksimume 6 jaroj. Samtempe estis aranĝataj monataj kursoj por instruontinoj pri ekzercado en periodo dujara, sume sep, kiujn absolvis pli multe ol 400 instruistinoj. Ĉi tiuj kursoj estis vizitataj eĉ de virinoj de aliaj slavaj nacioj, precipe bulgaraj kaj rusaj.

La serĉadon de vojoj al metode praktikata virina gimnastiko influis rimarkinde la gimnastiko de amerikaj Sokolinoj, kiuj enkondukis en ĝin elegantajn dancpaŝojn laŭ muziko kaj plibeligis per ili grandmezure la ekzercadojn libermovajn (sen ilaro), vicordajn, kaj la svarmludojn. Tiu ĉi estetika elemento rapide enradikiĝis en la malnova patrujo kaj jam dum la nunjara festo vidigos la virinaj ekzercoj ĝiajn postsignojn, precipe la libermovaj ekzercoj komunaj.

Tiu ĉi skolo estis favore akceptita hejme kaj en fremdlando. Ĉe okazo de la kroata sokola festo en Zagreb 1911 la tutan sudslavan publikon ravis la beleco de la libermovaj ekzercoj kaj de la ekzercoj sur paraleloj, kiujn prezentis la bohemaj virinoj.

Parolante pri la virina gimnastiko, ni ne povas silenti pri ekzercoj de la knabinoj en Sokolaro. Senpage, gvidataj de pura amo al la afero, la Sokolinoj instruas al knabinoj (lernantinoj 12—18jaraj la gimnastikon; sume al dekdu miloj. Ankaŭ en la lernejoj instruas pri gimnastiko la Sokolinoj. La bohema Sokolino trovas konvenan laborkampon eĉ en rusaj mezaj lernejoj kie hodiaŭ funkcias da ili 15, kaj kien mem la rusa registaro ilin invitas. La virinoj dediĉas sin ne sole al gimnastiko, sed ankaŭ al eduko pri kulturo kaj etiko, kiun ankaŭ la programo de Sokol ampleksas. Ili prospere funkcias en la klerigaj fakoj de la societoj kaj de la centro.

Ilia membreco ne ĉesas, kiam ili edziniĝas kaj sekve ne povas plu tiom, kiel pli frue, praktiki la ekzercadon. Kompense ili alkondukas en la Sokolaron siajn infanojn, kaj tiel okazas, ke la tuta familio estas sokola.

La virino - sokolino havas en la nacio gravan mision. Ŝi ne sole korpe ĝin hardas, sed ŝi estas reprezentantino de sokolaj principoj ankaŭ inter la ceteraj virinoj. Ŝi konfesas la egalecon kaj la demokratismon kaj batalas por ili, kiujn inter la virinoj tiom malfacile estas komprenebligi kaj apliki. Estante progresema,

ŝi kontraŭstaras la senbazan bigotecon, kreskantan tiom potence inter la virinoj kaj liberigas la virinon el la reginfluo de klerikalismo. Ŝi vivigas la nacian konscion kaj batalas kontraŭ lukso kaj suprajeco en la eduko de virinoj kaj instruas pritaksi homojn laŭ ilia karaktero, laboremo kaj oferemo por la tuto.

Tiun ĉi sian mision ŝi plenumas tiom entuziasme, ke ni plenfide povas diri pri la sokola movado inter la bohemaj virinoj, ke ĝi nun estas sur la sojlo de grandega evolucio. Eble oni povos iam diri — feliĉa estas la nacio, kies virinoj komprenas la celadojn de la viroj!

# JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

## KELKAJ LITERATURAJ RIMARKOJ PRI ESPERANTO. (*Fino.*)

Radikoj, kiuj ne estas troveblaj en la Universala Vortaro kaj en ĝia Aldono, sed kiuj estas jam ofte uzataj de la verkistoj esperantaj, sekve proponindaj al la L. K.*):

·abunda - ·adicii - aflikti (sklíčiti) - ·akcidento - ·aluminio - ·amfiteatro - anarĥisto (anarchista) - angoro (tíseň) - arda (horoucí) - ·asisti - ·atlaso - atrapi (přistihnouti) - ·aŭditorio - ·aŭtonomio - ·avansi (avanci) - ·baleto - ·balono - beata (blažený) - ·bileto - ·biografio - bizara (výstřední) - ·bombo - briske (úsečně) - buĥto (buchta) - centralismo (centralismus) - ·centralizi - cis- (trans-) - ·civito - ·debato - ·dekadenco - deputacio (deputace) - ·detektivo - digneco (hodnost) - ·dinamito - ·diplomatia - ·direkcio - ·disciplino - dispenso (prominutí) - ekspozi (vystaviti účinkům čeho) - ·ekvilibro - ·enciklopedio - ·emocio - ·etiketo - ·evolucio - flustri (šeptati) - footbalisto - Fortuno (Štěstěna) - fotelo (lenoška) - fugi (prchnouti) - galantomo (dvorný člověk) - graco (milost boží) - gurmande (labužnicky) - ·grimpi - ·hazardo - ·heziti (zdráhati se) - ·inflami - ·injekti - inkrusti (zdobiti řezbou) - inspekcio (dohlídka) - ·intervjuo - inundo (potopa) - jubeli (jásati) - ·jura - ·kabineta - kankano - ·kinematografo - ·klaki - kolbo (pažba) - koliero (náhrdelník) - ·kolosa (velkolepý) - ·konferenco - ·konflikto - ·konstitucio - ·kontinue - korepeticio (opakování) - ·kvadrilo - labila (vratký) - ·lukti - mapo (mapa) - mariaĝo (mariáš) - matrono - meningito (ztrnutí šíje) - ·mikroskopo - miliono - ·milimetro - ministerio (ministerstvo) - obtuza (tlumený) - ·oleandro - orĥideo - ornamento - ·papriko - ·pensiono - ·persvadi (přemlouvati) - ·pinakoteko - platona (platonický) - ·polipo - ·populara - poroza (pórovitý) - ·pretendento - ·procedo - ·reakcio - reciti - ·redukti - ·rektoro - ·reprezenti - reskripto (výnos) - revolto (od-

*) Vortoj signitaj per · troviĝas jam en la „Vortaro de Kabe“.

boj) - ·revuo - ·rezulti - ·rigora - rivalo (soupeř) - ·robo - ·roko - sekura (bezpečný) - senatoro (senator) - ·skandalo - skapuliro (škapulíř) - spektatoro (pozorovatel) - ·subvencio - susuro (šustění) - ŝoseo (silnice) - ·taroko(j) - ·tegolo - ·telegrafio - ·teleskopo - teniso - toasto (·tosto přípitek) - ·toreadoro - toro, (virbovo zápasnický býk) - ·transversa - traverso (nosník) - trista (truchlivý, smutný) - vakanco (prázdniny) - ·varia - viadukto (viadukt) - ·vikuno - ·vizio - volbi (klenouti).

Unualoke ni atentigas, ke la supraj rimarkoj neniel rilatas la terminologion teknikan, kiu jam per si mem havas fiksitajn regulojn por la akceptado de terminoj. Plue ni rimarkigas, ke la verketo estas tradukita kaj eldonita en tempo, kiam ne estis ankoraŭ aperintaj „Marta“ kaj la „Vortaro de Kabe“, en kiuj tamen la leganto povas trovi multe da cititaj vortoj en la samaj formo kaj senco. Tio certe pruvas, ke la esprimoj estis bone kaj laŭregule elektitaj kaj ke ili estas imitindaj. (Rim. La vorto „trista“, por iu „nekomprenebla“, troviĝas jam en Kabe: Internacia Krestomatio pĝ. 3 eld. 1907.) *Vlad. Tobek.*

## Z CELÉHO SVĚTA.

**VIII. Kongres v Krakově (11.—18. srpna 1912).** Vhodným roztříděním přihlášek ke sjezdu bude umožněno všem účastníkům získati ihned pokyny se strany pořadatelstva i od ostatních kongresistů navzájem. Jména přihlášených jsou zaznamenána v lístkovém katalogu nejen abecedně a pořadově podle čísel ale i podle zemí a zaměstnání, tak že i v poslední chvíli může každý nahlédnutím v tyto seznamy navázati přímý styk s tím neb oním účastníkem. K tomu slouží i zvláštní úřad, soukromá pošta, která bude zdarma obstarávati přijímání a doručování všech dopisů v místnosti sjezdové. Kromě té bude tamtéž otevřena filiálka pošty státní, v níž budou úřadovati od 8. hod. ráno do 7. hod. več. pouze úředníci Esperanta znalí. Ba i na hlavní poště budou nápisy esperantské a služba bude po dobu kongresu svěřena úředníkům-Esperantistům. Zásilky z ciziny, určené některému účastníku sjezdu, buďtež adresovány: Kongreso Esperantista en Kraków (por s-o X. Y. el ... na př. Praha). — Aby všichni cizí hosté mohli býti snadno ubytováni, otevře kongresní výbor informační kancelář na nádraží, kde bude se úřadovati dnem i nocí. — Seznam došlých dosud přihlášek bude již nyní uveřejňován v „Pola Esperantisto“. — K tomuto číslu Č. Č. E. jest přiložen přihlašovací list, na němž jsou vyznačeny též ceny všech kongresních publikací. (Přiloženým složním listem pošt. spoř. lze zaslati platy určené **pouze** krakovskému kongresu!!)

**Historio de Esperanto.** Pod tímto titulem vyšla právě práce Zakrzewskiho, odměněná v literárním konkursu sedmého kongresu. Doporučujeme čtení tohoto spisku jmenovitě všem, kdo připravují se ke zkoušce z Esperanta. Cena 50 hal. (Stejně významným jest dílko de Ladevèzovo: Demandaro pri la historio, literaturo kaj organizajoj de Esperanto. K 1·20).

**Výsledky propagandy**: „La Revuo" jakož i jiné časopisy přinášejí zajímavý dopis, kterým William Bailey z Manchestru sděluje s veřejností potěšitelné výsledky, jež nepřímo přivodil jeho esperantský překlad řečí proslovených na mírové schůzi v londýnské Guildhall býv. ministrem Asquitem a Lord Mayorem V. Strongem. Líčí známé přijetí padesáti londýnských hostí s Lord Mayorem v čele na pražské radnici a akcentuje cenné služby, kterými, dík Esperantu, mohl náš Ústřední Svaz B. U. E. hostům posloužiti. Jako pokračování těchto projevů jest trvalé navázání styků mezi Lord Mayorem, jehož zajímavá korrespondence jest uveřejňována v českých časopisech, a nově se ustavivším anglickým klubem v Praze, který k jeho doporučení současně překládá do češtiny a vydá vynikající dílo Norman Angellovo: Velká illuse. — Símě zaseté na půdu esperantskou dalo věru zisk neočekávaný.

**Švédský parlament** jednal na jedné ze svých posledních schůzí o způsobu, jak by bylo možno s jeho strany urychliti utvoření pomocného světového jazyka. Švédští Esperantisté postřehli, že nutno ihned informovati všechny členy parlamentu o stávajícím již a po 25 let žijícím jazyce mezinárodním — Esperantu, o němž snad mnohým z nich nedostalo se potřebných vysvětlivek a zasílají jim z té příčiny nejen tiskopisy vysvětlující dnešní rozšíření a význam Esperanta, ale i publikace v Esperantu vydané. Kdo může prospěti tomuto podniku, nechť zašle jakékoliv esperantské tiskopisy (letáky, brošury, časopisy a pod.) na adresu: S-o G. H. Backman en Helsingborg, Svedujo.

**V Tacomě** (ve Spojených Státech sev. Ameriky) byla vypsána odměna za nejvhodnější název slavností, které toto stotisícové město každoročně pořádá na počest cizinců a turistů. Mezi jedenácti sty podaných návrhů bylo zvoleno esperantské jméno „**Montamara festo**" (Tacoma leží mezi mořem a horstvem); o něm bylo již ve všech amerických časopisech jednáno s poukazem na Esperanto a lze tvrditi, že tento fakt upoutal pozornost širokých vrstev k našemu jazyku. Bližší informace o slavnosti jakož i o městě Tacoma zašle zdarma kancelář „Montamara Festo Association" Tacoma Wash. U S. A. (Skribu salutan esp. karton por celo propaganda!) Esperantské hnutí v Tacomě podporuje jmenovitě místní Obchodní komora.

Admirál Bayle a generálové Sebert a Priou rozeslali všem spolkům „**Červeného kříže**" celého světa a všem zástupcům vlád, které obeslaly letošní IX. Mezinárodní konferenci „Červeného Kříže", důležitý oběžník upozorňující na Esperanto a jeho význam pro služby v polních nemocnicích vojenských. — Významný článek o Esperantu ve službách armády „Zlo Babelu a zítřejší válka", napsaný vrchním inženýrem hydrografického námořního ústavu Rollet de l'Islem, vyšel v březnovém a dubnovém čísle revue „Opinion Militaire". (Cena 60 ctm.; adresa: Paris, rue de Lyon 24—26.) — Dosud byly „Červeným Křížem" vydány praktické 10 hal. příručky esperantské (ve formě klíče Čefečova) v angličině,

dánštině, němčině, francouzštině, španělštině, italštině, ruštině a švédštině. — Předsedou francouzského esperantského spolku Č. K. jest generál Priou v Paříži (23. av. de Ségur), předsedou španělského generál Markiz de Polavejia.

Mezinárodní **svaz Esperantistů - právníků** upozorňuje cizozemské spolky právnické (advokátní komory) na svůj význam a na služby, které již za pět let svého trvání vykonal. Jeho služby jsou již pravidelně organisovány nejen v 10 státech evropských, ale i v Australii a v Americe.

**Subvence** věnované každoročně francouzskými městskými a okresními radami místním spolkům **na propagandu Esperanta:** Angers 50 fr., Avignon 50 fr., Châlon s. S. 500 fr., Creusot 100 fr., Grenoble 100 fr., Roubaix 50 fr., Rouen 50 fr., St. Denis 75 fr., St. Maur 50 fr., dep. Le Cher 100 fr., dep. La Seine 300 fr. klubu pařížskému a 50 fr. klubu v Charenton, Marseille 50 fr., Toulon 100 franků, dep. Bouche du Rhône 50 fr. a Toulouse (již šestým rokem) po 300 fr.

**Z pařížských aviatiků** ovládají Esperanto: Farman, Conneau-Beaumont, Vidart, Gibert, Kimmerling, Train a Deperdussin. — Ředitel železniční společnosti **„Paris—Orléans“**, která vydala illustr. esperantskou brožuru o krajích, jimiž vedou její tratě, vyslovil se o Esperantu velmi příznivě, poukazuje na přečetné esp. dotazy, které jsou společnosti zasílány ze všech zemí. Této korrespondence použije prý jako důkazu proti těm, kdo pochybují o významu a rozšíření Esperanta. — V první polovici dubna uspořádala průmyslová sekce pařížského klubu esp. **obchodní výstavku** v místnostech „Centra Oficejo“. Mezi čestnými členy této korporace jsou členové senátu, poslanci a zástupci předních průmyslových a obchodních firem. — **V Havru** (Francii), kde vyučuje se Esper. na dívčí obchodní škole, uspořádala městská rada veřejný kurs Esperanta v radnici a přednášku prof. Mesnyho o významu Esperanta pro školu. — Mezinárodní výstava v **le Mans** (v záp. Francii) vyznamenala stříbrnou medalií esperantskou exposici místního klubu. — Esperantu otevřely své sloupce **v Německu** četné časopisy: přes rok již vychází pravidelná týdenní esperantská rubrika v berlínském denníku „Deutsche Warte“ a poslední dobou vyhradily Esperantu místo i časopisy: „Der Vortrupp“ (Lipsko), „Allgemeiner Wegweiser“ (v 700.000 exempl.; Berlin), „Werdauer Tageblatt“ (v Sasku) a „Auerbacher Zeitung“ (v Sasku). — **V Drážďanech** již 175 veřejných i soukromých firem užívá prakticky Esperanta. Jím hovoří se i ve třech úřadovnách poštovních a v 19 policejních okresních úřadovnách. — Zemská turistická výstava **ve Stuttgartě** dala místnímu klubu esp. k disposici rozsáhlé místo, na němž bude umístěna výstavka esperantské literatury. — Na universitě **v Dublině** (v Irsku) a v ústředním spolku lékařů přednášel o Esperantu dr. G. James Johnson před vědeckým sborem. Náměstek krále Lord Aberdeen vyžádal si po té od přednášejícího mnohé informace o Esperantu a přijal protektorát pátého kongresu britských Esperantistů, který se koná letos v Portrush. Protektorem kongresu jest rovněž rektor dublinské university. — **V Capodistrii** (Přímoří) byl zakončen kurs Esperantský pořádaný prof. Dem. Cossarem slavnostní schůzí, jíž předsedal starosta města Bartoldo Sardotsch; týž poděkoval prof. Cossarovi a nadšeně vyslovil se o významu Esperanta.

Bibliografický spolek **moskevské university** oslavil 30. III. zvláštní schůzí 25. výročí vědecké a literární činnosti prof. R. F. Brandta. Rektor university a zástupci vědeckého světa ruského jubilantovi osobně blahopřáli. Na přání vyslovené zástupci esperantských spolků moskevských poděkoval prof. Brandt esperantsky. Četní z přítomných profesorů a členů akademie projevili Esperantu své sympatie. Mezi téměř 150 pozdravnými dopisy a telegramy vědeckých sborů a vysokých učení byla i řada blahopřání zaslaných korporacemi esperantskými.

**Letošní esperantské kongresy národní:** Současně se světovým kongresem v Krakově uspořádá tamtéž (11.—18. VIII.) U. E. A. svůj druhý sjezd. Francouzský svaz v Provençalsku, Jihozápadní Svaz a S. F. P. E. uspořádaly své sjezdy v Nize, Bordeaux a v Paříži. V květnu: Belgický sjezd v Gentu (26.—27.); Svaz „Bourgogne-Jure“ v Tournus (26.—27.); V. sjezd Britského svazu v Portrush (26.—28.); IV. sjezd dánských Esperantistů ve Vejle (26.—28.), svazu normandského v Louviers (16. června). Sjezd německého svazu v Danzig-Zoppot (27.—31. července). III. Kongres katolických Esperantistů a I. národní kongres v Budapešti po skončení světového kongresu. Kongres Amerického Svazu Esperantského v Bostonu (9.—12. července). II. Kongres australských Esperantistů v Melbourne.

**Šeková banka esperantská** v Londýně, založená autorem světoznámých propagačních klíčů Esperanta H. F. Hövelerem (Čefeč), uveřejňuje rozpočet za rok právě minulý: Účet u banky otevřen 358 firmám; na 4260 předložených šeků a složních listů vyplaceno 200.000 K. Na posledních dvou kongresech, jakož i na letošním (v Krakově) bude zřízena v přijímací budově filiálka banky. — Výhod esperantské banky může použíti každý, kdo má styky s celým světem, ať má obnosy velké či sebe menší přijímati nebo vypláceti (předplatné na časopisy, objednávky knih a pod.). S přihláškou za účastníka třeba složiti určitý obnos, z něhož k jeho rozkazu jsou splátky jiným účastníkům v jejich prospěch do účtů připisovány nebo naopak. Chci-li na příklad, jsa účastníkem, zaslati předplatné na časopis firmě X., zašlu bance oznámení o tom a firmě X. poukáži zvláštním korespondenčním lístkem obnos. Výlohy omezují se při tom pouze na známku. Je-li f-a X. rovněž účastníkem, připíše banka obnos k jejímu dobru, mně pak k tíži. Není-li f-a X. s bankou ve spojení, vyplatí jí pak banka obnos přímo. Zjednodušení styků na poli peněžnictví, které sprostředkuje v Rakousku poštovní spořitelna, stejným způsobem sprostředkuje esperantská banka mezi podavatelem a příjemcem bez ohledu na země a různost měny. Pomocnou jednotkou při všech operacích jest 1 Spesmil (1 Sm.). O pomocné měně bylo mluveno již v minulých ročnících.

Abychom vyjádřili v korunách hodnotu 1 Sm. s ohledem na dnešní kurs, dělme číslo 25259 dnešní cenou koruny, udanou ve francích: na př. platí-li dnes rakouská koruna 1·04 franku, jest: 1 Sm. = 25259 : 1·04 = 2·429 K a 1 K = 0·412 Sm. Informace o bance zašle: Čekbanko Esperantista en London S. W. Merton Abbey.

**Universala Esperanto-Asocio** čítá koncem května přes 7200 zaplativších členů kromě 116 členů ženského odboru, 79 členů dělnického odboru a 372 členů odboru pro výměnu a styk mezinárodní.

**Gramofonové desky** s esperantským textem byly uvedeny do obchodu firmou A. Besnard v Paříži (26. rue Antoinette). I. kantoj: „La Espero“ de L. L. Zamenhof. „Al Vi“ de Bamberg. II. Deklamoj: „Prego sub la verda standardo“ de L. L. Zamenhof. „Blanka vualo“ de V. Devjatnin. Cena dvoustranné desky 4 Fr. (Žádejte katalog esperantských písní.)

Esperanto vřaděno **do učební osnovy** večerních kursů městské školy v Liverpoolu, obchodní školy ve Stanislavi. Esperantu učí se na školách v Lille (ve Francii) 2000 žáků; ze 445 zkoušených 397 prospělo. — Svaz **katolických** Esperantistů v Holandsku čítá již tisíc členů. — Z Amsterodamu vydali se tři Esperantisté na cestu do Afriky a do Palestiny. Chtějí se během osmi let opět pěšky navrátiti a po celou cestu užívati pouze Esperanta. — **V Sofii** přednášel o Esperantu a důležitosti „Fundamenta“ pro jeho nerušený rozvoj dr. Ivan Šišmanov, prof. literární historie na tamnější universitě a bývalý ministr vyučování. Jeho vystoupení ve prospěch Esperanta jest mocnou podporou celému hnutí v Bulharsku. — **V Budapešti** proslovil na schůzi poštovních úředníků významnou řeč ve prospěch Esperanta prelát A. Giesswein, poslanec. — Národní Rada Česká vydala loňského roku v Esperantu článek prof. J. Hanticha o podvodech páchaných při sčítání lidu v Rakousku a rozeslala ho do celého světa esperantského se žádostí, aby bylo z něho čerpáno pro národní časopisy. — Druhý literární konkurs byl vypsán svazem **katalánských** Esperantistů. Mezi dárci odměn za nejlepší práce jest jmenována i městská rada tarasská (Tarassa, nedaleko Barcelony), poslanci a četné národní korporace. Tato soutěž jest obeslána padesáti pracemi. — Řádný kurs Esperanta byl právě zahájen na universitě a na vyšší obch. škole barcelonské; mimořádný na městském lyceu v Lisaboně. — Městská správa **jerusalemská**, uznávajíc význam pomocného jazyka zvláště ve městě navštěvovaném tolika cizinci, rozhodla se připojiti k veřejným vyhláškám esperantský překlad. — Na Novém Zeelandě bylo již před dvěma roky 300 Esperantistů; dnes již ve ve všech dílech ostrova jest Esperanto domovem. — **V jihoafrických** britských osadách učí se Esperantu čety mládeže sdružené ve „skautu“. Redaktor časopisu mládeže upozorňuje na Esperanto pravidelnými články propagačními. — Mezi **americkými** časopisy, které přinášejí časté zprávy o Esperantu, zvláštní zmínky zaslouží článek p. R. Honomichla v „Osvětě Americké“ (Omaha). Nejen četní naši rodáci v Americe jsou horlivými Esperantisty, ale i v kruzích amerických Poláků naléžá E. mnohé stoupence, dík informačním článkům v časopise „Polniska“ vycházejícím v Bostonu.

Národní propagační časopisy esperantské uveřejňují se všech stran docházející zprávy o přečetných schůzích, kursech, valných hromadách, zábavách atd. Řada měst nejen evropských ale i zámořských denně rozmnožuje šiky přátel Esperanta neúnavnou prací propagační **ve stech a stech kursů.** Slavnosti Esperantistů, na nichž jsou zastupovány nejvyšší úřady a instituce, navštěvované sty účastníků, nejsou již zvláštností. Na př. **v Narvě** (v Rusku) přítomno propagačnímu večeru na 800 osob, esperantské **přednášky Parrishovy** v Belgii, Německu a Dánsku těší se návštěvě 400 až 600 hostů; **v Charkově** (v Rusku) navštívilo propagační schůzi spojenou se zábavou na 2000 osob. — Hrabě Ihojiša, býv. ministr zahraničních záležitostí **v Japonsku**, byl zvolen za předsedu Japonského Svazu Esperantistů. — **Švýcarská** vláda sbírá návrhy týkající

se reformy kalendáře, o které se mluvilo již na kongresu Obchodních komor v Londýně 1911. Dosud bylo jí zasláno 28 návrhů ze všech dílů světa, z nichž 12 jest redigováno Esperantem, kdežto ostatních 16 jest psáno sedmi různými jazyky. — Spolek červeného kříže v Drážďanech vydal vyhlášku o přijímání dobrovolníků pro zdravotní službu **v Tripolisu;** přihlášení mají se vykázati znalostí francouzštiny nebo Esperanta. — Na IV. sjezdu Esperantistů **v Brasilii**, jehož účastníci používali bezplatně železnici i telegraf, byli zastoupeni všichni ministři a vynikající osobnosti městské správy.

**En Rumanujo** perdis nia movado unu el siaj plej viglaj laborantoj: je fino de la pasinta jaro mortis en Bukuresti nia amiko s-o Dr. Gabriel Robin. (43-jara), kiun ni dum la lasta libertempo akompanadis tra Praha ĉe lia vizito post la antverpena kongreso. Lia laboro por Esperanto, same kiel en ĉiuj iakaj organizaĵoj, faris lin baldaŭ bone konata kaj estimata. Vegetarana societo rumana, kooperativa presejo kaj komerca societo, blindulejo „Vatra Luminoasa" kaj la forte enradikiĝinta movado esperanta en Rumanujo estas plejparte rezultato de lia laboro; la Rumana Esp. Asocio elektis lin sia prezidanto. Lia libera tempo (li posedis bakteorologian laboratorion kaj estis laboratoriestro de Civilaj hospitaloj kaj institutoj) estis destinita al redaktado de la „Rumana Esperantisto" (pli malfrue „Danubo"), al instruado en la kursoj kaj al preparado de novaj kaj novaj verkoj pri kaj en Esperanto. Multaj planoj, pri kiuj li revis, restis nefinitaj, sed la rumanaj samideanoj pruvos per sia imitinda persisteco, ke ili gvidos la movadon daŭre en la noblaj intencoj de nia neforgesebla amiko.

# ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

**Valná hromada Ústředního Svazu Bohema Unio Esperantista** koná se v sobotu, dne 29. června 1912 o 8. hod. več. v kanceláři ve Vodičkově ul. 38.

Tamtéž zasedá o 10. hod. dop. **zkušební výbor**; přihlášky ke zkouškám třeba zaslati nejpozději do 15. června. Žádejte zkušební řád. (Zkoušku podstoupili dosud 34 kandidáti.)

Příspěvky na **Zamenhofův fond** 100.000 h.: Esperantista Klubo en Zlatá Koruna 1000 h., Esperantista Klubo en Radvanice (Slezsko) 1070 hal., Esperantista Klubo en Praha 500 hal., f-ino N. Žabkova el Praha 550 hal., dohromady 3120 hal.; poslední výkaz 67.246 hal. **Celkem 70.366 hal.** (K 703·66).

**Al vizitontoj de la VIII. kongreso!** Kiu intencas veturi el Parizo aŭ el la okcidentaj landoj eŭropaj al Krakovo, elektu la plej konvenan kaj rektan vojon tra Praha, kie li trovos amikan akcepton kaj ĉiujn bezonajn konsilojn en la kancelario de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista Praha II., Vodičkova ul. 38.

Rekta, rapidvagonara linio komunikas inter Paris-Nancy-Strassburg-Stuttgart-Nürnberg-Furth-Praha-Kraków.

Kiu el Bohemoj veturos al la kongreso, sciigu tion al la kancelario de B. U. E. por ke li povu ricevi informojn, kiujn la kancelario mem ricevas de la kongresa komitato.

Laboro dediĉita al diskonigo de la **sokolaj festoj** fremdlande alportas bonajn rezultatojn. Ne sole vico da vizitontoj anoncas

sian alveturon, sed ĉiutage ricevas nia kancelario fremdlingvajn ĵurnalojn, kiuj enhavas nacilingvan tradukon de nia esperanta flugfolio, almetita en 3200 ekz. al „Esperanto"-ĵurnalo en Genève. B. U. E. turniĝis al la kancelario de la sokolaj festoj kun peto, ke ĉi tiu mem garantiu en intereso de organizitaj informoj liverataj al la fremdaj, anonciĝantaj gastoj esperantistaj unuecon de la tuta entrepreno, kiun Unio vekis kaj de komenco sukcese gvidas. Ĉiu, kiu volas proponi siajn servojn al tiu ĉi afero, turniĝu sole al B. U. E. (ne plu al Sokol, kiu ĉiujn laborojn rilate la feston kaj Esperanton transdonas al Unio). La „Sokola Unio" subtenis la eldonon de la flugfolioj pri la festo kaj pri Praha sume per 200 K.

**Laŭ adreso de s-o inĝ. Kazi-Girey.** Invititaj per via telegramo (ke vi alveturos el Dresden dimanĉon, la 14. de IV. je la 3 17 posttagm.), ni atendis kvar en la stacidomo, sed aŭ Vi ne alvenis aŭ Vi ne klopodis esti rekonita. (La duan tagon samhore ni refoje vane Vin serĉis en la stacidomo.) Post kelke da tagoj ni eksciis de s-o Svačina el Č. Budějovice, ke Vi tamen estis en Praha; sed Vi ignoris la telegrafe alvokitan delegiton de U. E. A. sinjoron Kühnl, kies adreson Vi sciis; Vi eĉ ne trovis konvena aŭ persone lin viziti aŭ skribe klarigi Vian, de ni ne atenditan kaj ĝis nun al ni ne klaran konduton. Se Vi elserĉis alian Esperantiston, Vi malgraŭ tio povis elserĉi ankaŭ la Esperanto-oficejon en Vodičkova ul. 38 kaj klarigi la aferon. Ne opiniu, ke ni forgesis Vin kaj la gastamecon, sed kiu nin evitis, tiun ni evidente ne povis servi. Per tiu ĉi nia klarigo estu proklamitaj senbazaj kaj „neesperantismaj" tiuj eldiroj de homoj, kiuj, sekve de via „vizito", akuzis nin pro negastamo.

**La ĝenerala kunveno 1912 de B. U. E.** okazos la 29. de junio vespere en la kancelario. Samloke matene je la 10 horo ekzamenoj pri Esperanto antaŭ la komisio.

Du someraj **kursoj** estis malfermitaj de Boh. Propaganda Societo en la kancelario de B. U. E.: elementa (lundon, jaŭdon) gvidata de s-o A. Zahel, konversacia (mardon) gvidata de s-o E. Kühnl. — „Esperantista Klubo en **Praha**". Laŭ decido de la komitata kunveno okazinta la 30. III. 1912 turnas sin la estraro al ĉiuj membroj de la klubo kun insista peto, ke ĉiu laŭeble partoprenadu la kluban vivon, memorante la profiton, fluantan el ofta vizitado de la membraj kunvenoj. La kunvenoj prezentas eblecon perfektiĝi en la esperanta konversacio, por kiu celo estis restarigita konversacia kurso, komenciĝanta ĉiuvendrede post la 8. horo vespere en Esperanto-oficejo, Vodičkova 38, kie nun troviĝas la kluba kunvenejo. Sur la programo de la poste sekvanta kluba agado mem estas paroladoj, informado pri novaĵoj en la mondo esp., recitado, amuzo k. t. p., ĉio kompreneble laŭ kapableco de la partoprenantoj en Esp. Dum la somera sezono estos la kunvenoj tiom pli interesaj, ĉar kiel ĉiujare nia klubo gastigos multe da Esperantistoj fremdlandaj, kiuj trapasados nian urbon, veturonte al la VIII. kongreso. Riĉa biblioteko prezentas abundan kvanton da modelaj verkoj esp. kaj la multenombra gazetaro ebligas konstantan informiĝadon pri la stato de nia afero. La gazetoj estas por la membraro elmetitaj en la sama oficejo krom dum la klubaj kunvenoj, ankaŭ ĉiutage, kiam ĉeestas komitatanoj de Unio, t. e. ordinare de la 11—1 h. posttgm. P. T. membroj, kiuj havas hejme librojn prunteprenitajn el la biblioteko

jam pli longe ol 4 semajnojn, estas treege petataj, redoni ilin senprokraste. — La filio de „Československá Obchodnická Beseda" en **Král. Vinohrady** arangîs paroladon pri „Esperanto por la komercisto" de s-o Karel Procházka; la rezultato estis kontentiga: kurson gvidatan de s-o Poustka vizitadis 25 membroj. — En la komerca lernejo de s-o direktoro Fr. Švorc en **Praha** (Václavské nám. „Zlatá Husa") instruadis 32 lernantojn pri Esperanto s-o adj. Kašpárek. La kurso daŭris de la 15. XII. ĝis la 30. IV. kaj finiĝis per studado de la komercaj leteroj. — Kurson de la E. Klubo en **Smíchov**, gvidatan de s-o J. Podlipský vizitas 15 lernantoj.

En **Mikulovice** ap. Znojmo, kie s-o faka instr. J. Jeřábek instruas pri E. en siaj tri klasoj la gelernantojn, nia lingvo profunde enradikiĝis: la geinfanoj kutimis la regulan instruadon kaj ekkoninte la profitojn, kiujn Esperanto alportas, lernas ĝin diligente. La vesperan kurson vizitas precipe la gekolegoj de s-o instruisto. Ankaŭ en „Moravský Jih" aperis jam lia regula esperanta rubriko. — En **Německá Olešná** apud Strmilov gvidas kurson esp por fervoraj samideanoj s-o instruisto J. Träger. — En **Písek** gvidis trimonatan kurson por 8 lernantoj f-ino Fr. Křivancová, kiu publikigas en „Písecké Listy" kaj en „Otavan" artikolojn pri Esperanto. Ĉe okazo de la loka ekspozicio en septembro la klubo projektas elmontri esperantaĵojn. — E. K. en **Golčův Jeníkov**: la ĝ. kunveno elektis la 3. IV. s-ojn Dr. J. Sedláček prezidanto, J. Chvála vicprez., K. Klee sekr., Al. Kropáček kas., J. Jindřichovský bibl. — Du kursoj de s-o Budínský en **Poděbrady** donis al nia movado 12 novajn adeptojn. La nomita samideano publikigas artikolojn pri Esp. en la loka gazeto „Nezávislost". — E. K. en **Č. Budějovice** salutis la 12. IV. kiel gaston s-on inĝ. Kazi Girej el Orienta Azio, kiu pasigis en la urbo du tagojn, entrepreninte ekskurson al Hluboká. Kunveno de la klubo, kiu speciale estis aranĝita, estis multnombre vizitita.

REDAKCE „OSVĚTY LIDU" dokázala, že nejedná se jí tak o správnou informaci veřejnosti jako o všemožné potlačení fakt, která jí byla zaslána a která by čtenářům dala příležitost nahlédnouti, jak povrchně jest (a bohužel chce býti) red. její esperantské rubriky p. dr. Schulhof informován o otázkách, které pokouší se tam luštiti. O našem hnutí a vykonané práci nesdělil čtenářstvu dosud téměř nic positivního — jen o tom uznal za vhodno „informovati" čtenářstvo, že naše dosavadní práce jest bez základu, stavěná od střechy, a že bude záhodno stávající organisaci ignorovati, aby mohl společně s p. odb. učitelem Kudrnou z Chrudimě založiti na tříštěných tak silách celku novou „oficielní" organisaci východočeskou. (Z činosti Unie cituje na př. „schůze nesoucí hrdé jméno kongresů"). Již v č. 3. Č. Č. E. na str. 47. jsme vysvětlili jeho mylný názor a dokázali jsme, že jeho zprávy o stávajících poměrech třeba přijímati s náležitou reservou, jmenovité pokud se týče dat z doby, kdy náš Ústř. Svaz B. U. E. byl zakládán. Článek svůj na str. 47. Č. Č. E. zaslali jsme redakci „O. L." se žádostí, aby byl otištěn a tím nesprávné údaje opraveny. (Nechceme hledati v této události záminku ke změně přátelských poměrů, které mezi námi a p. dr. Schulhofem panují!) Čekali jsme téměř s určitostí, že redakce uzná naše právo hájiti se, leč místo našeho článku, který byl hozen do koše, vyšla v „O. L." dne 13. dubna odpověď na něj s poznámkou, že jest prý „plný neodůvodněného podezří-

vání a že jest psán tonem, pro jaký v „O. L." nikdy nebude místa" (čtenář, který přečte si znovu článek ten na str. 47. Č. Č. E. pozná, že jest psán věcně a tonem slušným!). V odpovědi ujišťuje pan dr. Sch. ctěnou Unii, že „její význam pro esperantské hnutí v našich zemích oceňuje plně" (uznání takové dosud nebylo zřejmo ani z jednoho ze článků předcházejících, které mluvily pouze o vymyšlených chybách) a že nechce hledati námi ignorované původce rozkolu (litujeme, pane doktore, že nemáte tolik odvahy; poznal byste onu hlízu na těle Esperantismu a jistě byste se rozhodl po jejím prozkoumání, stejně jako my to učinili, k operaci). „Od idey utvoření východočeského svazu", píše dále, upouštíme a svaz ten ani v rubrice „O. L.« ani na sjezdu propagovati nehodláme". Ke konci opět tvrdí, že k úsudku, jako by založení ústředí bylo bývalo předčasné a bez základu, vedl prý ho ten fakt, že „ani v Pardubicích nebylo spolku a že z takových snad ani neexistujících jednotek ústředí vzniklo". Pokud toho se týče, vysvětlujeme panu dr. Sch. — co mu ostatně již bylo vysvětleno, ale co on i na dále v tisku umlčel: Esperantské hnutí v Pardubicích bylo s Unií ve spojení od 21. ledna 1908. V září 1908 založen tam 12 osobami za účasti zástupců Unie kroužek, který až do polovice r. 1910 (7 čtvrtletí) příspěvky řádně vyrovnával. Hnutí tamnější vedl náš horlivý stoupenec pan uč. F. Košťál (později společně s p. dr. Fouskem). Tento pak, když loňského roku zahájil s p. dr. Sch. kursy veřejné ve školní místnosti (viz č. 10 Č. Č. E. 1911), oznámil nám, že kroužek zanikl. Tolik o první organisaci pardubické, po jejíž existenci, jak veřejnosti p. dr. Sch. opět, ač informován, sděluje, „marně bylo pátráno".

Leč souhlas v názoru o zbytečnosti officielního ustavování východočeského svazu, projevený v odpovědi na náš neotištěný článek v „O. L.", jest v přímém rozporu se 4. bodem programu kongresu kutnohorského. (První východočeský kongres o výstavě v Nasavrkách nazývá sám pan dr. Sch. v „O. L." ze dne 10. března „téměř nahodilou schůzkou", jakož i další čtyři „schůzemi podobnými"):

**Pořad pátého kongresu východočeských esperantistů** v Kutné Hoře, který pořádán bude o svátcích svatodušních dne 26. a 27. května 1912 pod protektorátem sl. rady král. hor. města Hory Kutné. I. den: 1. Uvítání p. t. hostí na nádraží Kutná Hora město. 2. Posnídávka (hotel „Stoupa"). 3. Prohlídka památek kutnohorských (výklad průvodcův výhradně v Esperantu). 4. Kongres o 11. hod. v sále Wladislavském ve Vlašském Dvoře, v bývalém to sídle králů českých. 5. Společný oběd v sále Měšťanské Besedy. 6. Akademie tamže. 7. Zábavní večírek. II. den: 1. Prohlídka městského musea. 2. Prohlídka památek sedleckých se světoznámou kostnicí. Pořad kongresu: 1. Zahájení a volba předsednictva. 2. Řeč p. dr. Schulhofa, lékaře z Pardubic. 3. Pozdravy a zprávy z jednotlivých měst východočeských na sjezdu zastoupených. 4. Návrh na utvoření Svazu Východočeských Esperantistů. 5. Volné návrhy, kteréž nutno podati písemně do 15. května. — Pořad „Akademie" uveřejněn bude později. Přihlášky k účinkování v Akademii buďtež zaslány do 24. května. U příležitosti sjezdu uspořádána bude též esperantská výstavka místního klubu. Každý Esperantista, ať člen, či nečlen některého sdružení odkudkoliv jest srdečně vítán. Veškeré dotazy a přihlášky buďtež řízeny předsednictvu Esperantského Klubu na Horách Kutných.

*Klubu kutnohorskému přejeme ze srdce, aby tento pátý kongres upoutal k Esperantu pozornost veřejnosti a aby vzbudil trvalý zájem o studium našeho jazyka v nejširších kruzích. Vždyť výsledky naší propagační práce jsou vždy potěšitelné, pamatujeme-li, že síla spočívá pouze v jednotě, v jednotě přátel.*

Jak v „O. L." poznamenáno, bude lze účastníkům kongresu kutnohorského (26. a 27. května) súčastniti se i jiného současného kongresu v Přerově (27. V.), neboť tento druhý den bude věnován pouze důkladnější prohlídce městských památek kutnohorských.

**Kongreso de Esperantistoj el Moravio kaj Silezio en Přerov** okazos lundon, la 27. de majo je la 10. horo matene en la „Akcia bierfabriko" (Komenského ulice). Programo: I. Esperanta ekspozicieto (alportu objektojn). II. Paroladoj (sole en Esperanto) pri esperantaj demandoj. Informanto: s-o prof. Fridrich en Prostějov.

Inter la nomoj de arangantoj oni trovas ne sole nomojn de estimataj niaj amikoj sed ankaŭ de tiaj samideanoj, kiuj ĝis nun ne konis nian centran Asocion B. U. E. aŭ fine, kiel ekzemple s-o Krumpholc, kiu rekte laboris kontraŭ ĝi de post la unua momento de ĝia fondiĝo; tiu provis kun s-o Čejka kontraŭ unuanima decido de ĉiuj societoj malebligi la realigon de nia sana centra organizaĵo.

## IOM DA INSTRUO.

**Suezský průplav.**

Již ve starověku byl učiněn pokus spojiti Středozemní moře s Rudým mořem. U Herodota čteme, že egyptský král Necho podjal se tohoto díla, které však neskončil. Po sto letech vykonali tuto práci Peršané. Až do dneška zachovalo se několik rytin do kamene, které nám vyprávějí, že za panování Daria byl Suezský průplav otevřen. Tento první průplav zachoval se do osmého století a Arabové, dovážející obilí z Egypta, velmi ho užívali. Roku 1854 nabídl anglický inženýr Leseps egyptskému místokráli své služby. Po dvou letech obdržel svolení ku přestavbě průplavu a založil společnost, jež měla za účel sebrati potřebný kapitál. Ale poněvadž Angličané všemožně činili té věci překážky, nebylo možno dáti se do práce až po dalších třech letech. Hlavní zásluha o splnění plánů Lesepsových náleží egyptskému místokráli, který krom značné peněžité podpory propůjčil k tomu 25.000 domorodců. Po desíti letech bylo dokonáno ohromné dílo, které stálo skoro půl milliardy franků; tato částka byla sebrána ponejvíce akciemi. Na počátku měla Francie $^2/_3$ těchto cenných papírů, $^1/_3$ egyptský místokrál, ale později Britanie, vidouc důležitost této dopravní dráhy, sprostředkující spojení s Indií, vých. Asií a Australií, odkoupila většinu akcií. Dnes projíždí se průplavem téměř výhradně, ačkoliv poplatky jsou dosti veliké. Každá loď musí platiti z tuny $8^1/_2$ franku, 10 fr. za dospělého cestujícího, 5 fr. za dítě. Při velkých lodích jde poplatek do tisíců, ale úspora času, uhlí atd. jest přece tak značná, že každá loď raději zaplatí takovéto výlohy.

***Pokuste se přeložiti a překlad srovnejte se článkem, který bude uveřejněn v příštím čísle.***

**Lingva klarigo al demandantoj.**

Vi plendas, ke ne ĉiuj esperantaj tekstoj estas same facile kompreneblaj kaj vi demandas pri la kaŭzo. La kaŭzo estas simpla: ne ĉiuj, kiuj uzas iun ajn lingvon, ĉu Esperanton, ĉu lingvon nacian, estas same bonaj stilistoj; krom tio estas multaj bedaŭrinde delogataj de la facileco de Esperanto kaj ili verkas (eĉ poem-

ojn!) tuj, post kiam ili apenaŭ komencis kompreni la lingvon. Ili skribu sed ili ne rilatadu kun la presejo! Tio helpos ilin — ili lernos; tio helpos la ceteran esperantistaron — ĝi ne perdos sian konfidon je verkoj presitaj; tio helpos Esperanton — ĝi ne difektiĝos. Se la komencantoj tralegus almenaŭ kelke da verkoj de Zamenhof, ili vidus, kiel mirinde logika kaj sekve klara estas la pensmaniero en Esperanto kaj ili certe ne skribus tiel nekompreneble, kiel pli ol unu „ŝatas“ fari. Tiaj aŭtoroj eble opinias, ke la lingvo (kaj ĉiuj alinaciaj legantoj) ekzistas sole por iliaj provoj lingvistikaj. Sekve la kulpo ne estas en la lingvo sed en la facilanimeco de tiuj, kiuj — ne ellerninte Esperanton — uzas ĝin en la presaĵoj malbone. La mondo esperantista ne toleru, ke tiamaniere estu minacata la pureco de nia literaturo kaj ĉiam kondamnu la verkojn kondamnindajn; plej multe povas servi en tiu ĉi afero la redakcioj, kies devo estas rifuzi artikolojn erarplenajn kaj laŭmerite kritiki la verkojn fuŝverkitajn. Kiu aŭtoro ne scias ankoraŭ la gramatikajn regulojn kaj eraras ĉe la uzado jen de kondicionalo, jen de akuzativo, de ablativo absoluta k. t. p., tiu certe ne estus eĉ per aludo konigata al la legentaro — se li tiel fuŝus sian nacilingvan literaturon.

Aliaj samideanoj nin demandis, kial ĉe kelkaj aŭtoroj vane ili serĉas la vortojn „hejme(n)“ aŭ „dome(n)“ kaj „mi opinias“ kiuj formoj estas por Bohemoj kompreneblaj kaj kial tiuj aŭtoroj fabrikas por tiuj ĉi ideoj formojn absolute nekompreneblajn (en tia senco): „ĉe min“, „mi kredas“. — Kial? Ĉar ili sendube ne scias sufiĉe bone Esperanton, por ke ili vidu, kio estas evitinda naciismo fremdlande nekomprenata kaj kio estas klara, simpla esprimo Zamenhofa. Nia Majstro mem eĉ ne unufoje uzis la formon: „mi iras ĉe min“ (vidu „Fundamenton“: kiam mi venis al li, li dormis § 20. 9. li venis al mi tute ne atendite § 22. 15. kiam vi venos al mi; antaŭ ol vi venos al mi § 24. 6. venu al mi hodiaŭ vespere § 18. 5. — alporti domen § 13. 3. knabino venis domen § 17. 1. tempo iri domen § 28. 6.). La eraran formon sendube vi povas trovi ĉe iuj francaj samideanoj ne sufiĉe spertaj en Esperanto, kiuj tradukas simple la francan vorton „chez moi“ — „ĉe mi“, „ĉe min“. Ĝi vere estas bedaŭrinda, se ili respondas je via demando „kion signifas tia nezamenhofaĵo“, kvazaŭ ili estus pravaj. Ne sole ne pravaj, sed eĉ nekompreneblaj ili estas! Kaj tio devas instigi nin, ke ni atentigu ilin pri la eraro; respondu al ili en senco de tiu ĉi klarigo kaj aldonu: „ĉe“ (laŭ Zamenhof kaj liaj verkoj) signifas lokon kaj ne povas esti uzata kun akuzativo por montri direkton „en mian loĝejon“. La direkton montras prepozicio „al“ kun nominativo („al“ ne povas montri pro sia speciala karaktero lokon!); konsilu al ili, ke ili ellernu uzadi la vorton „hejme“, „dome“, kiuj sole povas esprimi la sencon de ilia „chez moi“.

N i m e m n e s o l e o p i n i a s, s e d n i a n k a ŭ k r e d a s a l v i, ke estas bezone atentigi pri similaj eraroj, kiuj post kelke da tempo povus malproksimigi nin de la aliaj nacioj sur la kampo de reciproka kompreno sole kaŭze de supraĵa ellerno de Esperanto iliaflanke. — La dua vorto de vi aludita „kredi“ same kiel „do“ estas de kelkaj nespertuloj ankaŭ erare uzata, plej ofte en senco de vortoj „pensi, opinii“. Interesa estas, ke tiuj ĉi du lastaj vortoj preskaŭ neniam estas de ili uzataj — kvankam komprenataj! Klarigu al viaj korespondantoj (sendube germanaj, ĉu ne

vere ?). kiuj faras tian eraron, ke „kredi‘ signifas „glauben“ (vèřiti) kaj „opinii, pensi“ (míniti, mysleti) egalas „meinen“. Mi kredas je unu Dio, sed mi pensis, mi opiniis, ke mi perdi monon. Se vi konvinkis min, do mi kredas, vi estas ja kredinda homo, sed oni ne opiniu, pensu, ke ĉiu estas nia amiko. Ne kredu tiun, kiu trompis vin; mi opinias, ke vi jam komprenos la diferencon. Kion vi pensas pri mia projekto? Mi trovis la aferon pli facila ol mi pensis. Fundamento: ... mi pensas, ke la fervojo estos konstruata pli ol tri jarojn § 25. 25. Mi kredeble ne povos veni **al vi** hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi mem havos hodiaŭ gastojn § 41. 8. kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon § 11. 2. („Kredu‘ sole tiam, kiam vi konvinkiĝis.) — Pri la vorto „do“. Ĝi absolute n e identiĝas kun la germana „doch“; tiu ĉi lasta („doch“) signifas esp. „ja“, „tamen“, sed la esperanta „do“ signifas „also“, france „eh bien“, boheme „nuže“, „tedy“. Vi scias ja (boh. vždyť víte), ke neniu povas fariĝi sperta, se li ne legas multe da bonaj tekstoj; legu do ĉion, kion skribas nia Majstro.

## FAKTOJ.

**Esperantista Poŝkalendaro 1912** eldonita tiun ĉi jaron por la kvina fojo, enhavas en la nunjara volumo sufiĉe da leginda materialo, kiu, redaktita de s-o Dr. Schramm, altiras intereson de la tuta esperantistaro. Oni trovas tie la kutiman dataron kun sufiĉa spaco por notoj, serion da artikoloj pri la esperantaj organizajoj, nomaron de esp. fakaj asocioj, gazetoj, landaj ligoj, monan tabelon internacian, praktikajn konsilojn, nomaron de la laste aperintaj verkoj esperantaj ktp. En la artikolo „memorindaj datoj“ estas kelkloke cititaj datoj el historio de nia bohema movado. Ni citu la jenajn: 30. junio 1907: Estis fondita la Centra Asocio Bohema Unio Esperantista de ĉiuj tiame ekzistintaj kluboj bohemaj en Aŭstrio. 26. septembro 1909: Malfermo de la Unua Bohema Esperantista Kongreso en Praha. 9. decembro 1902: Estis fondita la unua bohema societo esperantista „Esp. Klubo en Praha“. — 28. marto 1592: naskiĝis J. A. Komenský (Comenius), kiu skribis en la jaro 1641 pri la bezono de helpa lingvo en sia verko „Via Lucis“. (La kutima nomaro de la societoj esperantaj ne estas enhavita en la poŝkalendaro kaj la redakcio preparis apartan eldonaĵon; sed tiu tamen ne aperos, ĉar la direktoro de Universala Esperanto - Asocio malpermesis al ĝi la publikigon de la adresoj de la delegitoj k. t. p. de U. E. A., sen kiuj la listo ne estus kompleta kaj ne plenumus sian celon. La firmo Möller & Borel tiom pli bedaŭras la decidon de U. E. A., ĉar ĝi apogis kaj helpis la Asocion ĉiel de post ĝia ekzistado. En la pasintaj jaroj U. E. A. senkondiĉe permesis la publikigon de siaj reprezentantoj en la poŝkalendaro, ĉar ĝi bone ekkonis la valoron propagandan per tio faritan por U. E. A. De nun la a d r e s a r o d e s o c i e t o j eldonata de f-o M. & B. ĉesos aperi.)

**Fruktoj de Esperantismo.** En unu cirkulero (ne en Č. Č. E.) dissendita la 23. X. 1911 al la kluboj de Unio estis aludita eldiro, per kiu la sekretario de Centra Oficejo en Parizo s-o G. Chavet esprimis sian opinion koncerne la laboron de Unio kaj la „laboron“ de ĝia spite fondita „kontraŭpezo“ — la „ankaŭ-asocio kun Český Esperantista“. La sciigo pri tiu eldiro estis komunikita al Unio de s-o Erhard Urban el Parizo, kiu mem aŭdis la jenan,

prave de s-o Chavet esprimitan priŝaton de la vera laboro: „mi scias, ke en Bohemujo estas sole Unio, kiu laboras“. Tian juĝon timas esprimi neniu amiko de Esperanto kaj precipe ĝojiga estas tio, ke ĉiu honesta homo tiel taksas la kondamnindan, je senĉesaj insultoj limiĝantan „laboron“ de la spita „pseŭdoasocio“. — Sed kio okazis, danke la esperantismon ordonantan ĉion aprobi, nenion kondamni kaj la bonon kun malbono blinde kunigi! La laste aludita „kontraŭpezo“ eksciinte tiun fakton, proklamis s-on Ed. Kühnl (la raportinto pri ĝi estis ne s-o Kühnl, sed Unio) „mensogulo, kiun oni neniam povas kredi“. S-o Urban vizitis s-on Chavet por memorigi al li liajn vortojn sed tiu — sentinte la devon juĝi publike — preferis proklami la siajn supre aluditajn vortojn nedirita j. Kvankam la redakcio de la „kontraŭpeza“ organo Ĉ. E. estis pri ĉio tuj informita de s-o Urban, ĝi preferis silentigi lian leteron kaj publikigis sole la „esperantisman“ leteron de s-o Chavet. Jen la teksto de la letero, per kiu s-o Urban sin turnis sensukcese al „Český Esperantista“: Paris 14. III. 1912. Legante en la unua n-o de „Český Esperantista“ artikolon traktantan pri la diro de s-o Chavet mi permesas al mi doni al Vi per tiu ĉi letero la postulatan klarigon, nome: la konatan fakton mi mem sciigis al s-o redaktoro Kühnl, do, Vi vidas, ke oni al s-o Kühnl povas kredi. S-o Chavet estas certe tre bone informita pri la laboro de „Bohema Unio Esperantista“ kaj pri — ankaŭ laboro Via; alie li ne povus ion similan proklami. Erhard Urban, Paris, rue Monge 71. Granda Hotelo „Globo“.

Kvankam sendube ĉiuj niaj legantoj konsideras la redakcion de Ĉ. E. ne tiel grava, ke ni dediĉu al ĝi nian atenton, tamen e n i n t e r e s o d e n i a o f e n d a t a h o n o r o ni devas ekparoli.

## ĈU ESTI AŬ NE ESTI?

**GRAVA! Pri centra organizo esperanta.** Laŭ la nuna stato de la demando oni vidas, ke la propono, kiu estis prezentita al la antverpena kongreso, nur dum tiu ĉi jaro estas de la Esperantistaro serioze esplorata. Estas fakto, ke ekzistas jam partianoj kaj malamikoj de la ideo pri la nova centra organizo kaj ankaŭ — indiferentuloj. De la flanko de Centra Oficejo estas ĉiam subtenata la propono, kaj proklamata preskaŭ solvita kaj akceptita de la kongreso 1911, sed tiu tamen elektis nur specialan komision por studi la demandon. Samtempe de la organizo dependigas la C. Of. alian demandon: la financan subtenon de la oficejo kaj de la organo „Oficiala gazeto“. La opinioj esprimataj en niaj gazetoj esperantaj estas tiom diverĝantaj, ke apenaŭ ni povas atendi unuaniman harmonion. Unuj proklamas: la nun ekzistantaj organizaĵoj esp. tute ne sufiĉas pro sia speciala karaktero; estas bezona centro reprezentonta nin antaŭ aliaj asocioj. Aliaj diras: Esperanto estas nur lingvo kaj kiel tia ĝi havas sian Akademion kun la Lingva Komitato, super kiuj neniu administra organizaĵo estas starigota. Laŭ la praktika kaj ideala flankoj de nia afero kontentige laboras jam la Universala Esperanto-Asocio kaj ĉiu nova tutmonda centro signifus por tiu ĉi konkurencon kaj ambaŭ reciproke ruiniĝadus. En unu el la lastaj n-oj de sia organo „Esperanto“ publikigis U. E. A. kelke da detalaĵoj el informiloj sendataj de la C. Of. konfidencie al kelkaj personoj kaj la aŭtoro de tiu artikolo esprimas miron, kial la proponantoj de la Centra Organizo (la Centra Oficejo) ne volas

publikigi la bilancon de sia agado, subtenata ĝis hodiaŭ per malavaraj donacoj. Ĉu la sumo (jare 30.000 fr.), kiun la oficejo bezonas, enkalkulante la deficiton kaŭzitan ekzemple de la eldonado de oficiala gazeto, kiu atingas ĉiujare 3—4000 fr. — estas kolektota pere de organizaĵo, tio estas demando solvota. Ĝis la fino de 1910, sekve dum la kvin jaroj de sia ekzistado. ĝi elspezis sume 115.000 fr. kaj en formo de donacoj ĝi enspezis 119.000 fr. En tio ne estas enkalkulataj la kongresaj kontoj kaj male — citas „Esperanto“ — la Lingva Komitato partoprenas en la sumo sole per 260 K por la lastjaraj elspezoj. S-o Hodler konkludas en „Esperanto“: Por trovi tian sumon estus bezone trudi al kvaronmiliono da Esperantistoj devigan pagon po 10 h. jare aŭ, se oni eĉ dekobligus tiun kotizaĵon, oni bezonus trovi 30 mil membrojn. Ke la rezultato estas nun neatingebla, pruvas U. E. A., havanta hodiaŭ 7000 membrojn. Sekve, li daŭrigas, nek „C. O.“ nek la „Oficiala Gazeto“ povas vivi per si mem, sen donacoj. Fine, kritikante la troan komplikitecon de la agado de „C. O.“, li aludas unu el ĝiaj cirkuleroj, per kiu estis proponite fondi Societon de amikoj de Esperanto, kiuj mone subtenadus la Centran Oficejon. Sed se ĉi tiuj foje ekprojektus ŝanĝi la principojn de nia lingvo (la afero ne estus nova, ĝi sole ripetiĝus post la morto de Dr. Javal, la unua monhelpinto) ĉu la nepaganta Esperantistaro tolerus tion? Sendube ne, kaj la „Amikoj“ ĉesus pagi. La rezultato de la traktaĵo estas: „Ĉar oni volas premi sur nin, realigante la organizaĵon antaŭ la kongreso, la Esperantistaro havas tre simplan respondon: nenion pagi ĝis oni prezentos al ni publikajn kalkulojn, kiuj permesos serioze juĝi la situacion kaj vidi, ĉu la mono, kiun oni petas de ni, ne estas plene senutila. Pro la intereso de la paco ni ĝis nun preferis silenti, sed pli grava ol amo al paco estas ĉe ni amo al ordo kaj klareco*). Nia movado ankoraŭ pli bezonas ordon, ol ŝajnan pacon, kiu enŝovos nin en marĉon“. La prezidanto de la Centra Oficejo kaj de la Administra komitato, s-o generalo Sebert sin turnis al s-o Hodler, postulante, ke li represu klarigan respondon je la ofendaj kaj malpravaj rimarkoj: laŭ tiu letero estas la sumoj cititaj de s-o Hodler elŝiritaj el tuto — sekve malprave aludataj. S-o Hodler mem estante membro de la komisio preparanta la finan starigon de la ĝenerala organizaĵo, parolas kontraŭ ĝi kaj ĝiaj decidoj. Malkonsento kun nia agadmaniero, diras s-o generalo Sebert al s-o Hodler, „ne donas al vi la rajton publike instigi niajn samideanojn, ke ili ne akceptu la decidojn regule alprenitajn kaj precipe ke ili ne partoprenu al la elekto de Rajtigitaj Delegitoj“. (Kiel ni diris jam en la 3-a n-o la R. D. povus voĉdonadi ĉe la kongresoj, ĉar ili reprezentus tiujn Esperantistojn, kiuj sendus sian kotizaĵon por la Centra organizaĵo). Sed pli malproksimen ankoraŭ celas la gazeto „Le Monde Espérantiste“: En la organizo ĝi vidas ne sole serĉadon de financaj rimedoj por personoj, sed eĉ kaŝitan danĝeron por Esperanto. La redakcio trovas en ia nova „Administra Komitato“ Kapon, „kies ideojn ni neniam praktike povus kontroli. Tia Komitato havus nur ŝajne demokratan aspekton,

*) Kiam la „Centra Asocio Bohema Unio Esperantista“ esprimis antaŭ kelke da jaroj la saman ideon pri „la paco kaj amo al vero“, ĝi estis de pli ol unu Esperantismisto bohema kaj fremdlanda konsiderata malprava. Tamen ĝi sekvis kaj sekvas sian decidon. Hodiaŭ la sama ideo tamen trovas jam lokon en la vicoj de „pacaj batalantoj“ tutmondaj!

reale ĝi estus aŭtokrata. Eble ĝi ne povus trudi siajn volojn al la Esperantistaro — pro manko de ĝendarmoj — sed ĝi certe permesus al si riskoplenajn traktadojn, kiuj alportus en niajn vicojn konfuzon kaj malordon“. Ĝi plue publikigas leterojn skribitajn de samideanoj rekomendantaj la organizon kaj adresatajn al Idistoj; la leteroj neniel donas al la skribintoj aspekton de kredindeco koncerne la lingvan netuŝeblecon. Estas do malfacile orientiĝi en la miksaĵo kaj amaso da artikoloj kaj flugfolioj. En unuj gazetoj ni legas artikolojn favorantajn la organizon, en aliaj oni ĝin proklamas senutila, konkurenca al U. E. A. kaj — eĉ danĝera Se la Esperantistaro volas esti reprezentota ĉe iu okazo, ĉu ne sufiĉas por tiu celo la nacia unuiĝo kun oficiala rajtigo donita al ĝi de la esp. kongreso, aŭ de ĉiuj ceteraj naciaj unuiĝoj? ĉu en multaj okazoj ne sufiĉus U. E. A. mem? La nunjara kongreso en Krakovo estos certe tre viva kaj ni konsilas nenion definitivan aprobadi antaŭ ol ĝi okazos. En la ĵurnaloj esp. aŭdiĝas ne sole aŭtoroj spertaj pri la vivo en Esperantujo, spertaj pro la kaŝe preparitaj atakoj kontraŭ Esperanto (tiuj aŭtoroj ĉiam atente traesplorados ĉian tiel gravan paŝon de la Esperantistaro), sed ankaŭ vico da Esperantistoj-komencantoj-idealistoj, kiuj aplaŭdas kaj laŭdas sen pli profunda esploro ĉion, kio havas la nomon „Esperanto“ aŭ — kio estas verda. Nenion ni perdos, se ni atendos duonjaron kaj oni priparolu dum la klubaj konvenoj la artikolojn de la esp. gazetoj, por ke oni povu veni en la kongreson informitaj, pretaj akcepti aŭ rifuzi. Ĝis tiam nenion pagu!

## WILLIAM THOMAS STEAD.

(*Represita el „The British Esperantist“.*)

En la momento, kiam ni preparas la nunan numeron de nia Gazeto, la numeron de la gaja maja monato, alvenas al ni sciigo pri la plej terura katastrofo de la maro. „Titanic“, la plej granda kaj luksa ŝipo en la mondo, en sia vojaĝo pereis kun si portante al la morto 1.600 el siaj 2.300 pasaĝeroj kaj maristoj. Por la Esperantistaro la katastrofo estas aparte dolora, ĉar sur la ŝipo estis W. T. Stead, unu el la vicprezidantoj de la Brita Esperantista Asocio, kaj Stead inter pli ol mil sescent kunvojaĝintoj eniris maran tombon. Tiu ĉi kruela bato de la sorto estas ankoraŭ pli terura pro sia subiteco, ĉar oni adiaŭis lin fortan kaj ĝojplenan malpli ol unu semajnon antaŭe kaj ĝis la lasta momento komunikis kun li per senfadena telegrafo. Apenaŭ ni scias skribi tiun ĉi nekrologon kaj apenaŭ ni povas kredi, ke nia multestimata samideano estas forrabita al ni; sed vana estas la espero, ke la lasta sciigo trompas nin.

W. T. Stead naskiĝis en la jaro 1849 kaj unue laboris en la oficejo de komercisto. Dum juneco li komencis verki artikolojn por la ĵurnalo ***Northern Echo*** kaj gajnis reputacion tian, ke en lia dudekunua jaro oni elektis lin redaktoro. Poste li fariĝis redaktoro de la ĵurnalo ***Pall Mall Gazette***, kaj en la jaro 1890 fondis la ***Review of Reviews***, revuon tre konatan de la Esperantistaro pro ĝia ĉiama fervoro por nia afero. Kiam Esperanto alvenis en Anglujon antaŭ dek jaroj, Stead estis unu el la plej agemaj subtenantoj de la nova lingvo, kaj tuj de tiu momento li energie helpis la movadon kaj kuraĝigis la unuajn lernantojn en Anglujo. Ni tre bone memoras la tempon en la jaro 1904, kiam okazis granda kunveno

en Londono por starigi nian Asocion. S-o Stead prezidis, kaj lia tiama parolado plena je vortoj de espero kaj kuraĝo entuziasmigis ĉiujn kaj donis al ni certigon pri la ekvivo de nia Asocio kaj la sukcesa estonteco de la movado en nia lando.

De la momento, kiam naskiĝis nia Asocio, Stead neniam lasis preterpasi okazon por helpi nin. En la unua jaro de nia vivo estis Stead, kiu senpage provizis oficejon, estis li, kiu garantiis nian financon, estis li, kiu en sia propra revuo kaj per diversaj artikoloj ofte reklamis kaj rekomendis nin en la publika gazetaro. En la komenco li fariĝis vicprezidanto kaj ĉiujare la membroj, memorante liajn grandajn servojn, reelektis lin. Ve, ke ni devas skribi subite pri la morto de tia nekomparebla amiko!

La personeco de Stead estis altira; por ĉiu li ĉiam havis afablan vorton; al neniu li rifuzis helpon aŭ konsilon. Pro la diverseco, sentimeco, kaj neordinareco de liaj multaj skribaĵoj, malamikoj kredeble ne mankis al li, sed ĉiuj konfesos, ke li skribis, parolis kaj agis sincere kaj honeste laŭ sia konvinko. En sia profesio li estis unu el la plej eminentaj membroj, ĉion scianta, ĉion komprenanta, intima kun imperiestroj, reĝoj kaj ŝtatprezidantoj egale kun la plej malriĉaj kaj malaltrangaj personoj. Antaŭ ĉio, li estis fervora laboranto por la mondpaco, kaj la rezultato de liaj senĉesaj klopodoj por la bono starados antaŭ ni, kiel lia monumento.

Al lia ploranta parencaro ni transdonas la konsolon kaj kondolencon, kiujn sinceraj esprimoj povas porti. Tre bone ni scias, ke la perdo, terura por ni, sendube estas por ili milfoje pli dolora. Estu mildigo de nia doloro en la konvinko, ke li mortis pace, kaj ke tiu grandanima, varmkora kaj pia homo adiaŭis la mondon kun preĝo kaj rideto sur la lipoj.

# BIBLIOGRAFIO.

**Gvidfolioj** (samformataj) aperintaj ĝis hodiaŭ: Ansbach (8 pĝ.), Bamberg, Barmen (8 pĝ.), Bath, Beaune, Berlin (12 pĝ.), Bordeaux, Breslau, České Budějovice, Calais, Carcagente, Cartagena, Cordoba, Cromer, Davos (8 pĝ.), Dijon (6 pĝ.), Douai, Dresden (4 pĝ.), Elberfeld (10 pĝ.), Gibraltar, s' Gravenhage (4 pĝ.), Grenoble, Hanover, Kiel, Koenigsberg, Kopenhag, Krefeld, La Rochelle, Le Creusot, Le Mans, Limoges, Lauhans, Lyon (6 pĝ.), Marseille, Moskva, Moulins, München, Odessa (4 pĝ.), Pleven (4 pĝ.), Poitiers, Pont-de-vaux, Portsmouth, Praha (4 pĝ.), Prostějov, Rostock, Rožnov p. R., San Sebastian, Saratov, Sofia, Solothurn, Spa (4 pĝ.), Stockholm, Fiflis, Tours, Warszawa, Višnij-Voločok, Vladivostok, Worms a. R., Woerishofen. Universitataj gvidfolioj aperis en Grenoble, Innsbruck, Nancy. — Ĉiu folio estas havebla ĉe la loka Turisma societo aŭ ĉe la esp. klubo. Ĉiuj kune estas mendeblaj ĉe Universala Esperanto-Asocio en Genève, 10. rue de la Bourse.

Novaj **gvidlibroj**: *Kraków*, urbo de la jubilea kongreso 1912 (ilustrita; 38 pĝ.). — *DresdEn kaj la Esperantistaro 1911* (ilustrita; 129 pĝ.).

**Diversaj**: *Ĉe f-o Hachette & Cie en Paris*, 79. bd. St. Germain: E. Privat: *Pri la esperanta literaturo* (14×20; 24 pĝ.). Prezo 75 hel. — E. Boirac: *Fundamentaj principoj de la vortaro esperanta I.* (30 pĝ.; prezo 50 hel.). — E. Boirac: *Vortaro de la oficialaj*

*radikoj de Esperanto* (27 pĝ prezo 50 hel.). — Fauvart-Bastoul: *Cours élémentaire pour apprendre l'Espéranto sans professeur* (11 × 17; 143 pĝ). Prezo K 1·50. — Esperantista Dokumentaro: *Sepa Universala Kongreso 1911* (15 × 24; 198 pĝ.). Prezo 3 K. Eld. Centra Oficejo en Paris, 51. rue de Clichy. — Dr. H. Dor: *Int. kongreso por la plibonigado de la sorto de la blinduloj* (7 pĝ.; prezo 25 hel.). Eld. P. E. S. Paris. — Prof. Dr. Aug. Forel: *Kulturceladoj de la nuntempo*; trad. Dr. F. Uhlmann (15 × 22). Eld. Univ. Esp. Librejo en Genève, 10. rue de la Bourse. — Bar. de la Motte Fouqué: *Ondino (Undine)*; trad. el la germ. lingvo K. Myslik (16 × 24; 55 pĝ.). Prezo 1·20. Eld. A. Schönfeld, Wien IX. — K. W. Bührer kaj Ad. Saager: *La organizado de la intelekta laboro per „La Ponto“*; trad. J. Schmidt (16 × 22; 157 pĝ.). Prezo K 4·80. Eld.: Librejo Fr. Seybold en Ansbach. Vidu la n-on 6). — C. F. Ramuz: *Aline*; trad. René de Saussure (12 × 19; 138 pĝ.). Prezo K 2·40. Eld.: Univ. Esp. Librejo en Genève. — H. Jost: *La plej bonaj spritaĵoj el Münchner Fliegende Blätter* (volumoj 1—70), (12 × 18; 63 pĝ.). Prezo K 1·45. Eld. Walther Fiedler, Leipzig. Vendejo: Esp.-Propaganda Instituto, Leipzig, Kaiser Wilhelmstrasse 13. Prezo 50 hel. — Esp. librejo Lindenberg: *Albumo de Dresden* (13 × 17 kun esperanta teksto) K 1·45 Tre bela kolekto enhavanta 20 ilustrajojn. — *Gvidlibreto tra Harlemo kaj ĉirkaŭaĵo* (Holando) 12 pĝ. — *Turismo ĉe la fervojaro de Paris al Orléans*; kun geografiaj kartoj kaj multe da ilustraĵoj. (15 × 24; 24 pĝ.). Rimarkinde bela verko (vidu pĝ. 64). — A. Tellini: *Ravenna* (13 × 20; 56 pĝ). Ilustrita gvidlibro. — Presa Esp. Societo: *12 poŝtkartoj „Praha“* kun esperanta klariga teksto (nigraj, koloraj). Prezo 60 hel. — B. U. E.: *20 poŝtkartoj „Praha“* kun esper. teksto (brunaj). Prezo K 1·10. — I. r. ministerio por fervojaj aferoj en Wien: *Pejzaĝoj en Aŭstrio* (11 × 25; 115 pĝ.). Unu el la plej belaj gvidlibroj kun multe da ilustrajoj. Ni havis jam la okazon atentigi en „Národní Obzor“, ke nenio estas tiom riproĉinda rilate la aranĝon kiel la germanigado de la stratnomoj kaj propraj nomoj en Praha (kiuj, same kiel la stratnomoj en la urboj de aliaj landoj, estas netradukeblaj), sekve „eraro“ en teksto esperanta tiom okulfrapanta, ke oni ne povas ne esti surprizita. La redaktinto forgesis eĉ meti en la nomaron de informejoj en Praha la Boheman landan ligon por turistoj (Příkop, 14.) sed ne forgesis anonci la privatan informejon en „Deutsches Haus“. Se la redaktinto estus laborinta en konsento kun la aliaj nacioj aŭstriaj, pri kiuj lia verko parolas, li ne bezonus nun aŭdi tiun ĉi pravan kritikon; kiom do helpas tia „aŭstria konferenco“, ĉe kiu antaŭ du jaroj oni reciproke promesis interkomunikiĝi kun ĉiuj ceteraj nacioj en Aŭstrio en okazoj de laboro, kiu rilatas la tuton, ekz. ĉi tie nian komunan ministerion? Ĉu oni ne ĉerpas instruon el tia kunlaboremo? — Göthe: *Hermano kaj Doroteo*. Trad. Benno Küster (11 × 16; 83 pĝ.). Prezo K 1·20. Eld.: Central-Verlag für Esperanto und Stenographie en Magdeburg. — Ĉe la sama eldonejo: A. Niemojewski: *Legendoj*. El pola lingvo trad. Br. Kuhl (11 × 16; 231 pĝ.). Prezo K 2·40. Ambaŭ el kolekto „Internacia Mondliteraturo“ n-o 1., 2., 3. — R. Schmidt: *La Amkonkurantoj*; triakta komedio (10 × 16; 45 pĝ.). Prezo: 60 h. — August Šenoa: *La trezoro de l' orajisto (Zlatarovo zlato)*; el kroata lingvo trad. Fran Kolar-Krom (12 × 20; 290 pĝ.). Propra eldono (sia: lia!!) — Ralph Waldo Trine: *En Harmonio kun la eterneco; paco, forto,*

*feliĉego.* Trad. Frederik Skeel-Giörling (12 × 17; 124 pĝ.). Eld.: G. Bell & Sons, Ltd. Portugal str. Kingsway, London. — Mavro Ŝpicer: *Kroataj poeziaĵoj*; kun literaturhistoria enkonduko (13 × 18: 60 pĝ.). Prezo K 1·80. Eld. la aŭtoro en Zagreb. La aŭtoro prezentas lertan tradukon de belaj poemoj ĉerpitaj el 21 naciaj poetoj. — Edgar A. Mc. Clellan: *Eĥoj el Manila*, aŭdotaj pere de originaloj kaj tradukoj en Esperanto (11 × 20; 99 pĝ.). Prezo K 2·90. Ĉe la aŭtoro en Manila, P. O. Box 636. (Tiu ĉi verko estas la unua eldonaĵo esperanta presita sur la Filipinaj insuloj.) — Mikaelo Cases: *Mistera Krimo*, amuza unuakta komedieto (12 × 18; 37 pĝ.). Prezo 1 K. (La teksto multloke nekomprenebla pro lingvaj eraroj.) — Artur Schnitzler: *La verda kakatuo*; unuakta groteskaĵo trad. de Joh. Schröder (11 × 16; 65 pĝ.). Prezo K 1·80. Ĉe R. v. Waldheim, Eberle & Co. Wien. — Van Stipriaan Luïscius: Karaktero; trad. el nederlanda lingvo (13 × 19; 30 pĝ.). Prezo 50 hel. Ĉe: Librejo „Espero" en Haag. — *Internacia Krestomatieto* kun laŭartikola vortaro seslingva; kolektis kaj eldonis A. Ajspurit (11 × 17; 48 pĝ.). Prezo 35 hel. Ĉe: Moskva librejo „Esperanto" 26. Tverskaja. — Stoner: *Patrino Anserino.* (Kolekto da rimaĵoj por infanoj verkita de sesjara Esperantistineto.) Eld. Esperanto-Oficejo en Washington U. S. A. — Ĉe „Danubo" en Bucuresti, 14. str. Belvedere: V. Gogol: *Maja nokto aŭ la dronintino.* El la rusa lingvo trad. Romano Frenkel (15 × 20; 35 pĝ.). Prezo 50 hel. — *Krestomatio por infanoj kaj komencantoj*, verkita en kunlaborado de diverslandaj Esp. sub redakto de Romano Frenkel. Kajero I. (Samformata.) Prezo 50 hel. (Rekomendinda!) — Biblioteko de Danubo. N-o 1.: Ivan Turgenĕv: *Fantomoj*; trad. el la rusa lingvo Dr. A. Fišer (11 × 15; 48 pĝ.). N-o 2.: Georgo Deŝkin: *Versaĵoj I.* Prezo de ĉiu kajero 25 hel. — Dr. St. Schulhof: *Kion la vivo alportis.* Dek originalaj poemoj kun antaŭparolo de M. Hankel (11 × 15; 30 pĝ.). Prezo 60 hel. Eld.: Univ. Esper. Librejo en Genève. (Ne estas bezone atentigadi, ke tiu ĉi dua serio da poemoj trovos refoje ĉe ĉiu leganto la saman akcepton kiel la unua kolekto, ĉar la stilo kaj riĉeco de la versoj estas rimarkinde bonaj.) — Dr. A. Schramm: *Esperantista poŝkalendaro 1912* (140 pĝ.). Prezo 1 K. Eld.: Möller & Borel en Berlin (vidu pĝ. 73.) — Georg Davidov: *Bibliografio*; *katalogo de la biblioteko 1884—1911* (15 × 22; 129 pĝ.). Prezo K 2·40. Eld.: Heckners Verlag, Wolfenbüttel, Germ. — H. Dion-Trouillon: *Oficiala Resumo de la teosofia doktrino*; trad. el la franca lingvo (11 pĝ). Prezo 20 hel. Ĉe P. E. S. en Paris. — Cl. de st. Marcq: *Resumo de la kurso pri teologio*; trad. A. Stas (32 pĝ.), 20 hel. Ĉe la aŭtoro en Antwerpen, 26. rue Appelmans. — Ĉe la sama: *Esperanta Psikistaro* II. eld. (80 pĝ.) — *Raporto pri la subkongreso de Esperanta Psikistaro* (31 pĝ.). — *Ruslanda adresaro*; volumo I. (11 × 15; 108 pĝ.). Prezo 1 K. Eld.: Librejo „Esperanto" Moskva, 26. Tverskaja (3000 adresoj). — *Oficiala Jarlibro de U. E. A. 1912* (169 pĝ.). Prezo K 1·20 (senpaga por membroj de U. E. A.; jara kotizaĵo K 1·20). — *Internacia Oficiala Universala Komerc-adresaro* (17 × 24; 100 pĝ.). Prezo 6 K. Eld.: Rob. Hess & Co. Magdeburg. (Krom firmoj korespondantaj esperante, precipe el Hispanujo kaj Germanujo, enhavas la libro represaĵon el Poŝkalendaro 1911. La prezo nekredeble alta!) — Esperanta biblioteko internacia: N-o 16. J. Borel: *Komerca korespondado.* N-o 17. J. Borel: *Konsiloj pri Higieno.* N-o 18. John Ruskin: *La reĝo de la ora*

*Rivero*, trad. el la angla lingvo Dr. Ivy Kellerman. N-o 19. G. B e l l y: *Sinjoro Herkules*, unuakta burleskaĵo; el la germ. trad. H. Arntz kaj M. Butin. N-o 20. J. A. M i t s c h e l: *La lasta Usonano*, trad. el la angla lingvo L. Wendell. N-o 21. F. H e r c z e g: *Hungaraj Rakontoj*; el la hung. lingvo trad. A. Panajott. N-o 22. H. B a n d l o w: *Rakontoj*; trad. el la plat-germana lingvo E. Scheerpeltz. Eld.: Möller & Borel en Berlin. Ĉiu kajero kostas 24 hel.

**KORESPONDANTOJ**: *56. S-o Roman Vergés, *Terrasa*. Str. Valle 61. H i s p a n u j o. — *57. S-o Arkadio Ustalov, *Tomsk*, Kievskaja 30. R u s l. Siberio. — *58. S-o Louis de Vos, *St. Nicolas* (Wals) Pl. Notre Dame 21. B e l g u j o (il. k., p. m.). — *59. S-o V. Petrov, vira gimnazio en *Egorjevsk* Rjaz. gub. R u s l a n d o (il. k. — dez. ekligi rilatojn kun samid. el Praha, kiujn li volas viziti dum la sokolaj festoj). — *60. S-o Jean Neybergh, Av. de Jette 151. *Bruxelles* B e l g u j o (il. k. kun la pm. bildflanke). — *61. S-o B. Danŝin, geol. stud. *Moskva*, Ermolaevskij, domo 7. kv. 17. *Ruslando* (dez. viziti la sokolajn festojn kaj ekligi rilatojn kun samideanoj el Praha, kun kiuj li povus fari ekskurson al la siluria formacio en Chuchle; serĉas sian malnovan korespondanton-s-on Jan Beneš, JUC.). — *62. S-o Ernest Drezin, Visokaja 33. *Kronstadt*. R u s l a n d o (il. k. pri lingvaj kaj propagandaj demandoj; pri supereco de Esperanto je aliaj mondlingvaj sistemoj). — *63. S-o M. Cimbalisty, *Rjazan*. R u s u j o (ĉiam tuj resp. il. k., p. m.). — *64. S-o B. Gluchovski, instruisto, Huta B. Hantke, *Rakov p. Czenstochova* R u s a P o l u j o (il k.). — * 65. S-o G. Chavean, *Angers* (M. a L.) rue Parcheminerie 52. F r a n c u j o. — *66. Membroj de la „Post-Esperantisten-Verein Zamenhof“ en Dresden serĉas korespondantojn. Sin turni al s-o H Paul Schmidt, *Dresden A.*, Kesselsdorferstrasse 72. — *67. S-o E. M. Bruno Riefling, *Kristiania*. Aars a Woss' skole. N o r v e g u j o. — *68. S-o Joh. Schmidt. *Amsterodam*. Vagenaarstr. 52. II. N e d e r l a n d o. — *69. S-o Antonio Blondina, *Habana*. Maurique 140. Insulo K u b a. — *70. S-o Martin Sitera, *Omaha* 13th str. 2727. U. S. A. — *71. S-o Harry Wood, *Durban* 37. Frere Ka. N a t a l, Suda Afriko. — *72. S-o Heriberto Diaz López. *St. Cruz de Tenerife*. I s l a s C a n a r i a s. — *73. S-o Carlos Peig, *Sabadell*, str. Puigcerda 22. H i s p a n u j o. — *74. S-o Joachim Blumenthal, *München*. Göthestr. 25. B a v a r u j o. — *75. F-ino Lud. Kiciovna, *Bochnia*, str. Niecala. G a l i c i o. — *76. La „Internacia Ligo de Kelneroj“ serĉas kunlaborantojn por verki manĝokarton en la jenaj lingvoj: angla, bohema, esperanta, franca, germana kaj rusa. Partopreni povas nur samprofesianoj kaj gekuiristoj. Skribu al s-o Erhard Urban, sekretisto de la Ligo. Paris, 71. rue Monge. Gd. Hotelo „Globo“. — *77. S-o Methodio Maranhão. Goyanna, *Pernambuco*. B r a z i l (kolektas interŝanĝe la portretojn de siaj gekorespondantoj). — *78. S-o Jos. Rigol, urba konsilanto. *Tarrassa*, Cren Gran 28. Hispanujo (il. k.).

En la red. de Č. Č. E. estas karto de *77. por s-o Jos. Hampl en Praha. Adreso? — Kiu el Praha korespondas kun s-o Petro Babič. G. N. O. Auckland N. Zealand? — S-o Volák (adreso?) ricevis karton de s-o Behor Baruch ĉe s-o David Sabar el Brousse, Azia Turkujo. Turniĝu al nia red. — S-o Břet. Matěj sciigu sian adreson al s-o Fr. Kroutl, leteristo en Č. Budějovice. Li sendos al li karton de s-o Branlio de Moraes el Rio de Janeiro. — Kiu scias ion pli detalan pri la nobela familio de Bakalář de Blankaj Agloj el Plaveč, skribu al nia red.

---

**Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.**